5-a Jaro. N-o 253/54 APERAS  SEMAJNE 15. Aŭgusto 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerĥner

Modernaj sociaj ideoj en la Antikveco

La sekvanta artikolo prezentas la unuan ĉapitron el pli ol 500-paĝa germanlingva verko kun titolo "Ĝenerala Historio de la Socialismo kaj de la Sociaj Bataloj". Ĝi aperis postmilite kaj estas konsiderata kiel unu el la plej bonaj verkoj tiuspecaj pro siaj objektiveco, klareco kaj koncizeco de l' pritrakto. Per tiu libro la aŭtoro, M. Beer, marksisto, nedisputeble akiris al si honoran lokon en la vico de la historiistoj. Trad.

De nura kronologia vidpunkto aŭ laŭ la unusola prikalkulado de l' tempo oni dividas la mondhistorion, kiel oni scias, en antikvecon, mezepokon, modernan kaj plej modernan tempon. Ĉe pli preciza konsidero montriĝas tiu ĉi divido de la historio kiel nesufiĉa, ĉar tute nenion signifanta. Se ni parolas pri antikveco, ni pensas pri la mezopotamiaj regnoj, pri Egiptio, pri la antikvaj hebreoj, grekoj kaj romanoj. Ĉu do la keltoj, germanoj kaj slavoj tute ne havis antikvecon? Kaj ĉu la antikvaj popoloj tute ne havis mezepokon nek modernan tempon? La mondhistorio ja ne temas pri unueca homaro, kiu proksimume ĝis la popolmigrado troviĝis en antikveco, tiam poste sinsekve trapasis mezepokon, modernan tempon kaj plej modernan epokon. Pli vere ĝi pritraktas diversajn ŝtatojn, regnojn, gentojn kaj popolojn, kiuj trapasis siajn proprajn kultur-etapojn je diversaj epokoj, ne atendante la saman paŝon kun la aliaj. Ĝi ne klarigas al ni, kiel ekzemple povis okazi, ke ni trovas novepokajn ideojn en la antikveco, eĉ ke la komenciĝo de l' moderna epoko en Eŭropo — la Renesanco — ree rilatis al la greka "antikveco" aŭ ke ni modernuloj ofte devas rekonsideri opiniojn kaj ideojn, kiuj estis elparolataj antaŭ pli ol 2000 jaroj de la "antikvuloj". Ĉu ĉi tiuj do estis superaj al tempo kaj spaco? Ĉu ili ricevis sian ŝaĝon per inspiro?

Ni pliproksimiĝos al la vero, se ni supozas, ke la antikveco ne formis spiritan kaj historian unuecon. Ankaŭ la antikvaj hebreoj, helenoj (grekoj) kaj romanoj havis sian antikvecon, sian mezepokon kaj sian modernan tempon. Ili nur aperis pli frue sur la scenejo de la tuthomara historio ol ekzemple la germanoj kaj la slavoj, kaj ili same trapasis siajn diversajn periodojn, produktis iujn instituciojn kaj ideojn, kiuj respondis ĉie pli malpli al tiuj ĉi periodoj, tiel ke la diversaj popoloj kvankam laŭtempe sekvantaj unu la alian, socie kaj intelekte paralel-iras. Se do la romanoj kaj germanoj en la 15-a kaj 16-a jarcentoj povis rilatiĝi spirite al la grekoj de l' 6-a kaj 5-a jarcentoj antaŭ Kristo, tio okazis nur tial ke la grekoj en tiuj jarcentoj jam trapasis siajn antikvecon kaj mezepokon kaj vivis en sia moderna tempo kaj produktis spiritajn produktojn respondantajn al tiu ĉi epoko.

Ĉiu el tiuj periodoj havas siajn difinitajn sociajn, ekonomiajn kaj spiritajn karakterizojn. En la antikveco — aŭ pli ĝuste — en la juneco de la popoloj — la homoj ĉie estas dismembrigitaj laŭ parenceco de l' sango en klanojn kaj gentojn, vivas komune laŭ la principoj de l' egaleco, konas nek privatan posedon nek monogamion aŭ urbojn; la intelekta vivo estas tre primitiva; tradicio kaj kutimoj reguligas la simplan vivon, kiu plej ofte estas nomada, — ĉiuokaze ĝi ne estas ligita al difinitaj teritorioj. Ĉefoj aŭ "reĝoj" gvidas estre la popolon. Literaturo en tiu tempo ne ekzistas. La koncernaj gentoj mem ne priskribas siajn sociajn instituciojn. Kion ni scias pri tiu epoko, ni ŝuldas aŭ al vojaĝantoj, kiuj vizitis el lando de pli alta kultura nivelo la regionojn de la primitivaj gentoj kaj postlasis al ni, instigite al pripensado per la kontrasto inter la trovitaj institucioj kaj siaj propraj, pri tio skribajn dokumentojn, kiel ekzemple faris Cezaro kaj Tacito pri la antikvaj germanoj; aŭ ni — la modernuloj — konkludas el la antikvaj legendoj kaj tradicioj, kiuj ĝisatingas la skribe-historian tempon, je la originaj institucioj. Kaj ĉar ni eltrovis regulan procezon en la disvolviĝo de la popoloj, ni estas rajtigitaj, starigi ĝeneraligon — teorion, ke ĉiuj popoloj sur primitiva, prasocia ŝtupo ne konis privatan proprajon, vivis komunume kaj estis organizitaj laŭ triboj.

De kiam la socialistoj akceptis tiun ĉi teorion en siajn prisociajn doktrinojn — en sian sociologion, kontraŭsocialistaj scienculoj de ĉiuj landoj klopodas argumenti, ke pri komunismo ĉe la primitivaj triboj oni ne povus paroli. Sed oni klare rimarkas la intencon, kaj oni ilin ignoras, ĉar ĉiuj estas verkistoj, kiuj sidas hejme kaj refutas ion per "ĉambra erudicio", kion samtempaj vojaĝantoj kaj okulatestantoj de ĉiuj epokoj kaj zonoj konstatis kaj priskribis en nedisputebla maniero, aŭ kion nerefuteble pruvas sociaj, religiaj kaj juraj postrestaĵoj.

La prasocia tempo ĉesas, kiam la triboj loksidiĝas, organiziĝas iom post iom teritorie (laŭ komunumoj, vilaĝoj, urboj, distriktoj kaj landoj) kaj transiras al la terkulturo. La koloniistoj provas daŭrigi la malnovan socian formon; ĉar alian ili ne konas; sed la novaj ekonomiaj kondiĉoj postulas novan ordiĝon, ĉar baldaŭ komenciĝas la disfalo kaj la klasdividiĝo de la antaŭa, unueca socio. Urboj estas konstruataj; la interŝanĝa komerco pliviĝas; la privata propraĵo forpuŝas la komunposedon. La adaptiĝo al la novaj kondiĉoj ne plenumiĝas glate. La malprofitigitoj kaj subpremitoj, la senheredigitoj kaj ŝuldiĝintoj kroĉiĝas al la malnova malaperanta egaleco, retenas ĝin en sia memoro kaj idealigas ĝin, parte kiel paradizon, parte kiel oran epokon. La biblia priskribo de l' Edena Ĝardeno kaj la forpelo de l' unuaj gehomoj el ĝi (1. libro de Moseo, 2-a kaj 3-a ĉapitro), kaj ankaŭ la versoj de l' greka poeto Heziod ("Verkoj kaj Tagoj", versoj 108—170) pri la ora epoko kaj ĝia malapero, estas la plej malnovaj esprimoj pri tiu ĉi animstato reganta la tutan antikvecon. Frutempe komenciĝas internaj konfliktoj; la malnovaj tribestroj — la tielnomataj "reĝoj" aŭ juĝistoj — cedas antaŭ la nobelara estreco, la bienegposedantoj ekprenas la superregadon. Ĉi tie ni jam trafis profunde en la mezepokon. Nur en tiu ĉi ŝtupo estiĝas

la literaturo kaj la religia dogmo: estiĝas mitologio aŭ teologio; estas skribataj leĝoj: Dek ordonoj en Izraelo, Leĝaro de Drakono en Grekio, Dekdutabula leĝaro en Romo. Ĉe la izraelidoj la mezepoko komenciĝis en la 10-a jarcento antaŭ Kristo; tiam la izraelidoj kreis al si reĝojn, sed la vera estreco estis ĉe la posedantoj — escepte eble je la tempo de David kaj Salomon. Ĉe la grekoj la mezepoko komenciĝis je la jaro 1000; ĉe la romanoj en la 8-a jarcento.

Dum la mezepoko disvolviĝis komerco kaj metioj, kies portanto fariĝas la urba burĝaro. Se ĉi lasta sufiĉe fortiĝis, la mezepoko trafas sian finon. La nobelaro burĝiĝas aŭ pereas; la malnova mitologia kaj teologia dogmaro estas skuata kaj novaj religiaj kaj filozofiaj konceptoj ekvojiras; la naturscienco estas estimata; la arto fariĝas pli libera kaj varia; la mezepokaj unuiĝoj dissolviĝas en siajn unuopajn elementojn — la moderna tempo naskiĝis. En Grekio ĝi komenciĝis en la 6-a jarcento; en Romo en la 2-a jarcento; en Izraelo tiu ĉi soci-ekonomia evoluo estis interrompata per la naciaj katastrofoj: en la jaro 722 Izraelo (la hebrea norda regno kun Samaria kiel ĉefurbo) estis venkata kaj detruata de la asirianoj; en la jaro 586 Juda (la hebrea suda regno kun Jeruzalemo kiel ĉefurbo) travivis la saman sorton: ĝi estis neniigata de la babilonoj; sed la religia disvolviĝ-procedo ne nur ne interrompiĝis, sed akceliĝis. Konforme al la novtempa spirito la judoj elakiris la etikan monoteismon; la grekoj la moralfilozofion, kaj ĉe iliaj gvidantaj intelektuloj la monoteismon kaj la socian etikon (Platonismo kaj Stoa). La sociaj bataloj estiĝintaj en la mezepoko pliakriĝas en la moderna epoko: en Izraelo la malriĉuloj kontraŭ la riĉuloj; en Grekio la popolamasoj (la "Demos") kontraŭ la akaparuloj kaj senproprigistoj, pli malfrue la proletaro kontraŭ la kapitalo; en Romo la plebanoj kontraŭ la patricioj, la senposeduloj kontraŭ la riĉuloj, la sklavaj amasoj kontraŭ la subpremantoj. La ĉefaj postuloj estas: likvido de l'ŝuldoj kaj novpartigo de tero kaj grundo. Sociaj reformoj estas ekprovataj: verŝajne komence de l'7-a jarcento en Sparto; 621 en Judeo; 594 (Solon) en Ateno; 367 kaj 133 en Romo. En Sparto la klasbatalo estis forigata por pluraj jarcentoj; sed en Ateno ĝi furiozis ĉiam pli akre; el ĝi naskiĝis la plej granda socifilozofo de l'antikva epoko: Plato (nask. 427, mortis 347); same tie estis kreata teorio pri komunismo kaj la natura rajto. En Romo la sociaj bataloj ne havis profundan revoluciigan influon sur la spiritan vivon, kiel entute la romanoj ne estis intelektula popolo kaj nenion faris por la pluevoluigo de l'religio, filozofio kaj de la sociaj ideoj; la romana intelekta vivo estas tre pala kaj malfrua rebrilo de l'helena. La romanoj ŝajne aplikis sian tutan intelektan energion je militoj kaj subjugigo al fremdaj popoloj, kaj je la bazigo de l' privatpropraĵa juro. En intelekt-evolua historio (escepte jura historio) la romanoj okupas tute negravan pozicion.

Unu rigardo al ekonomio kaj politiko de l'antikveco evidentigas la grandan diferencon inter tiama tempo kaj hodiaŭa. Unue oni ekrimarkas la plenan mankon je maŝinaro kaj pli subtilaj instrumentoj. Anstataŭe ni trovas amasojn da sklavoj; komence estis sampopolanoj, kiuj estis sklavigataj pro ŝuldiĝo, poste estas militkaptitoj, subigitaj indiĝenoj, aŭ de sklavkomercistoj rabitaj homoj, kiuj de grekoj kaj romanoj estis amase aĉetataj sur la merkato kaj submetataj al la plej senindulga ekspluatado; ĉe la ludoj ekzistis malmulte da sklavoj. Ankaŭ la ŝtata vivo aspektis aliel. La ŝtato estis dum jarcentoj nur unu urbo kaj ĝia plej proksima ĉirkaŭo; la plej famaj estis Ateno, Sparto, Romo. Tia urb-ŝtato (civito) greke nomiĝis "polis" (derivaĵo: politiko), latine "civitas" (derivaĵo: civilizo). Tiuj ĉi civitoj estis do malgrandaj teritorioj kun origine ĉ. 30 mil ĝis 40 mil liberaj civitanoj. En Grekio ekzistis pluraj tiaj civitoj, same en Italio. Parte per militoj, parte per ligkontraktoj ili unuiĝis en unu grandan ŝtaton. Ĉiu libera civitano estis samtempe soldato: la ekonomia laboro estis tasko de l' sklavaj amasoj. Unue la romanoj kreis iom post iom imperion kun regantaj tavoloj kaj subigitaj popoloj. La romanoj evoluigis pli malfrue ankaŭ la feŭdismon kaj la servutecon, kiam la sklavlaboro montriĝis neprofitdona aŭ nepolitika.

M. Beer. Elgermanigis N. B.

Kelkaj faktoj pri la Ĉinia-Orienta Fervojo

Dum la lastaj okazoj estas ĝustatempe karakterizi ĈOF kaj ĝian specifikan mastruman kaj politikan signifon.

Por konstrui la finan parton de la granda siberia fervojo, t. e. la ĈOF, estis farita kontrakto la 27-an de aŭgusto 1896 inter la ĉinia registaro kaj rus-ĉinia, poste rus-azia, banko.

Laŭ la kontrakto la ĉinia registaro havas nenian rajton krom difini prezimonaj k. a. rimedoj por konstrui kaj ekspluati la fervojan linion, eliris el la rusa regna kaso, enkondukanta tien akci-kapitalon de la ĈOF-a asocio (kiu estas donita al ĝi de la registaro je formo de senprocenta prunto de la ŝtat-banko). La konstruado, komencita en 1897 kaj finita en jaro 1903, postulis 459 milionojn da or-rubloj. Deprenante prezon de l'foririnta parto al Japanio (la S.-M. Fervojo), restas 378 milionoj da or-rubloj. Krom tio la kaso elspezis dum la unua dekjaro de ĈOF-a funkcio 178 milionojn da or-rubloj.



Ĉe la nordlimo de Ĉinio (Manĝurio). Parto de la Granda Ĉinia Muro

ĈOF estas konstruita kiel la tuta rusia fervojreto, larĝinterrele; nuntempe ĝi distancas sume 1727 kilometrojn. El tiu kvanto la Manĝuria-Pograniĉna fervojlinio okupas 1485 kilometrojn. Sur ĝi la 1-an de januaro 1928 estis 513 lokomotivoj, 11 259 varaj kaj 714 pasaĝeraj vagonoj. La fervoja linio havas 22 memstarajn oficejojn kaj la 1-an de aprilo 1928 tie laboris 30 185 laboristoj kaj oficistoj.

Ĝis konstruado de la ĈOF en tuta Nord-Manĝurio loĝis ne pli ol 2 milionoj da homoj kaj en regiono proksime lokita al ĈOF ne pli ol 1½ milionoj. Nuntempe en Norda Manĝurio loĝas 13,5 milionoj, el kiuj 10 milionoj en regiono de ĈOF. La transport-agado kreskegis en jaro 1924: estas transportitaj 2996 milionoj da milkilogramoj kaj en 1927 4882 milionoj da milkg., el kiuj danton por la asocio de ĈOF, oficantan kiel peranto inter la administrantaro kaj ĉinia registaro. Post 36 jaroj de la malfermo de l'ĈOF, Ĉinio rajtas aĉeti ĝin kaj post 80 jaroj de tiu momento ĝi senpage transirus al la ĉinia registaro.

En jaro 1898 la asocio de ĈOF kaj ĉinia registaro konfirmis aldonan interkonsenton por konstrui la sudan branĉon de Ĥarbin ĝis Port Artur, grandparto de kiu laŭ la portsmuta kontrakto foriris al Japanio (Sud-Manĝuria Fervojo).

La banko kaj mem la asocio de ĈOF estas mask-personaro, malantaŭ kiu sin kaŝis la rusa registaro, Senescepte ĉiuj

LINGVAJ RESPONDOJ
(Plena Kolekto)

Unu volumo in-8, 92-paĝa **1.— mk. g.**

Multfoje petoj estis faritaj al D-ro Zamenhof, ke li klarigu kelkajn gramatikaĵojn aŭ lingvistikajn demandojn. Ĉiam li respondis bonkore. Pli ol 100 respondoj estis tiel faritaj de li, kaj estis iom post iom publikigitaj en *La Esperantisto* (1889—1893); *La Revuo* (1906—1908); *Oficiala Gazeto* (1911 — 1912). Ili aperas nun en tiu verko logike ordigitaj kaj kun devenaj referencoj. Kvankam ili devas esti konsiderataj kiel oficialaĵojn, laŭ deziro de Zamenhof, konfesinde estas ke ili multe utilas al legantoj.

Havebla ĉe Administracio de SAT.

2½ milionoj konsistas el grenaj eksportaĵoj. Pli ol duono el la transportaĵa torento fluis tra Vladivostok (en jaro 1927 el 2600 milionoj da milkilogr. estas traveturigitaj 1415 milionoj).

En jaro 1928 ĈOF transportis pli ol 6000 da traveturantaj pasaĝeroj vojaĝantaj el kaj al Eŭropo.

Ĝis la tutmonda milito de ĈOF estas ricevitaj nur seriozaj malprofitoj. Pli poste la situacio ŝanĝiĝis dank' al amaso da milittransportoj el Vladivostok okcidenten. Dum la ĝenerala detruo kaj malpliboniĝo de l' mon-cirkulado la ĈOF donis ankaŭ nur malprofitojn en jaro 1918. Kaj nur en jaro 1921 ĝi denove komencis profiti iomete. Kiam la fervojo transiris sub sovetan-ĉinian gvidadon. subvencioj de lokaj ĉiniaj institucioj (meze 3½ milionoj da or-rubloj jare) alportis puran enspezon signifan, en 1924 — 7,5, 1925 — 15,5, 1926 — 16,1 kaj 1927 — 9 milionojn da or-rubloj.

Ĉinia-Orienta Fervojo estas konstruita kiel koncesia entrepreno de cara Rusio. En la gvidado de la fervoj-linio, eĉ en la tuta zono senfremdigita agis nur rusaj leĝoj kaj rusa registaro. Ĉinio fakte neniel partoprenis ĝin. Norda Manĝurio post la konstruo de ĈOF estis batalejo por imperialisma politiko de cara Rusio kaj sama ĝi restis post la malvenko dum la rus-japana milito.

La situacio ŝanĝiĝis nur post la oktobra revolucio, kiam estis forigita cara Rusio kaj regadis en Siberio civilmilito, kiu fortranĉis la vojon de l' leĝa posedanto, — soveta registaro, restigis la ĈOF en mano de Rus-Azia Banko, pliĝuste — de malleĝa franca — blankgvardia organizo, kies organiz-loko estas Parizo kaj kiu proprigis al si spite la statuto, nomon kaj eksterlandajn aktivojn de la banko. Ĉi-lasta, ne havante ian bazon, estas devigata mem cedi al Ĉinio kaj en jaro 1920 la gvidado de la fervojo estis reorganizata je komencoj de influo de ĉinia registaro. Sed la potencrego de la falsnoma banko, kiu nenion elspezis por la ĈOF, eĉ ne unu moneron, povis ekzisti nur mallongan tempon. Post fino de la civilmilito kaj fortikiĝo de Siberio, ne estis eble al soveta registaro, en Ekstrem-Oriento ignori la rajton de la posedanto, kaj jen finfine en Pekino estas farita soveta-ĉinia kontrakto, reguligante private la problemon pri ĈOF. Tial ke Manĝurio estis ekster la limoj de l' tiama pekina registaro, aŭtune en la sama jaro 1924 estas subskribita analoga interkonsento kun la manĝuria registaro, kaj de oktobro 1924 regis en la ĈOF miksita reĝimo de soveta kaj ĉinia administro.

La kontraktoj de la jaro 1924 agnoskas ĈOF kiel entreprenon nure komerc-karakteran, kiu transdonis ĉiujn antaŭajn publik-jurajn funkciojn de la administrado al la ĉinia registaro, al kiu private estas redonita la senfremdigita zono de ĈOF. Alia principo de la interkonsentoj estas miksita soveta-ĉinia egaleca gvidado, kies gvid-organo estas administrantaro el 10 anoj, difinataj po-egale de soveta kaj ĉinia registaroj. Ĉefas ĉinia prezidanto kun soveta vicprezidanto, kiuj kune gvidas aferojn de ĈOF kaj interkonsente ambaŭ subskribas dokumentojn. Ĉiutaga kaj teknika gvidado estas konfidita al subigita al la gvidantaro civitano el USSR kaj al du liaj helpantoj, el kiuj unu devas esti ankaŭ soveta civitano. Ĉiuj respondecaj oficoj estas distribuitaj inter sovetiaj kaj ĉiniaj civitanoj. Problemoj ne solveblaj de la gvidantaro estas transdonataj al kunsolvo de sovetia kaj ĉinia registaroj. Laŭ la mukdena interkonsento templimo de senpaga, mekanika transiro de la ĈOF sub nur-ĉinian regadon estas pli-mallongigita de 80 ĝis 60 jaroj, t. e. de 1983 ĝis 1963. Krom tio plia mallongigo ĝia povas esti interkonsentata. Alirilate la kontraktoj de 1896 restas samaj, dum ne okazos kontraŭoj al novaj interkonsentoj kaj rompo de la ŝtata subvencio de Ĉinio.

Malgraŭ tio, ke la ĈOF estas konstruita nur el rus-popolaj rimedoj, ĝia pura enspezo estas duonigita po-egale inter ambaŭ flankoj. La priskribita reĝimo de unu flanko asekuras normalan funkcion de ĈOF, kiel grava komerca kaj transporta ŝtata komunikilo, kaj de alia — prezentas al Ĉinio tutegalan rajton kun Sovetio, duone partopreni la gvidadon kaj enspezon de la entrepreno.

Leoĝo Kapustin.

LA FLANDRA MOVADO

Komencante ĉi tiun artikolon mi estas certa pri nekonsentemaj opinioj ĉe pluraj samregionaj K-doj. Sed se mi defendus la malan vidpunkton pri la afero, same mi renkontus nekonsentemon. Tio kuraĝigis min al la verkado de ĉi tiu paĝo.

En Belgio estas 7 milionoj da loĝantoj. Laŭ oficialaj apartigoj, 3 milionoj estas loĝantoj de franclingvaj regionoj. La 4 aliaj loĝas en la flandra parto. Tio tute ne volas diri, ke en Belgio estas 4 milionoj da flandraj loĝantoj. En grandaj urboj kiel Bruselo kaj Antverpeno, la lingvo ĉefe uzata estas certe la franca. En la urbetoj kaj en la centroj industriaj la komercistoj kaj la burĝaro uzas plejparte la francan lingvon. Kaj eĉ la gvidantoj de la Flandra Movado ne forgesas lernigi francan lingvon al sia infanaro, ĉar ili konscias, ke la franca lingvo estas ilo pli valora, pli utila ol la flandra. Sed en la unuagradaj lernejoj oni nur lecionumas flandralingve. Tiel okazas, ke la laboristaro flandraregiona nur scias sian lingvon kaj ne la francan, dum en altgradaj lernejoj la franca lingvo estas la ĉefa. Tiu situacio estigis malegalecon inter franclingvanoj kaj flandralingvanoj. La unuaj trovis la vojon pli facilan al superaj studoj, ol la lastaj. Kaj en ĉiuj fakoj de la vivo, en la armeo, en la instruistaro, en la registaro, malegaleco regis.

Kiam laboristo ekzemple (pro deviga militservo) estis soldatiĝinta, alveninte la kazernon li ne trovis solan ĉefon, kiu scipovis lian lingvon. Kaj pro tiuj miskomprenoj[1] oftege malplivaloriĝis la flandralingvanoj. Oni punis ilin, dum iliaj franclingvaj kamaradoj estis preferataj de la oficiroj. En la administracioj ĉiuj oficistoj nepre devas scii la francan lingvon, dum la franclingvanoj ne bezonas koni la flandran lingvon.

Tiu malegaleco estis la bazo por la postuloj de la flandria popolo. — Intertempe okazis la milito 1914—18. Belgio estis invadita. Germanaj armeoj estris super ambaŭ regionoj, la franclingva kaj la flandralingva. La germana imperialismo tuj spertis, ke la supremenciita spiritostato povus helpi al ĝi. Kaj la germanoj pensis pri sia nacia himno al pligrandigo de la patrolando.

La rolo de la germana imperialismo

Germanio povus etendiĝi ĝis la Norda Maro, perforte subigante Nederlandon kaj aneksante Flandrion. Tiele Germanio havus eblon rekte ataki Brition kaj Francion. Estas evidente, ke ili ne klarigis al la flandroj tiujn siajn intencojn, sed aĉetis kelkajn propagandistojn, kies tasko estis montri al la flandra popolo ĝian servutan situacion inter la belga loĝantaro.

Tiu ĉi konscio jam estinte estis facile disvastigata, kaj nun oni allogis la popolon plenumante al ĝi kelkajn postulojn: oni flandrigis la Gentan universitaton kaj sukcesis naski "Memstaran Registaron Flandran". La ĉefoj de tiu registaro (la "aktivistoj") estis invitataj al Berlino ĉe la kancelieron. Multaj promesoj kaj intencoj estis pridiskutataj, kies precipa senco estis unuigo de Flandrio en Germanion.

Tiuj naciemaj agoj ne estas agrable priskribindaj por mi. Sed por kompreni la Flandran Movadon, estas nepra tasko. — Post la milito, la movado malkreskis. Sed okazis, ke en ĉiu partio politika troviĝis kelkaj personoj, kiuj opiniis interese por sia situacio revivigi tiujn emojn. La partioj, kiuj ĉefe enhavis tiuspeculojn, estis la katolika kaj la socialista. Ĉi lasta komencas kompreni sian eraron. La Katolika Partio ankaŭ suferas pro tiu movado, tute neatendite; ĉar favorante unue tiun movadon, nur kun politikaj celoj, ĝi helpis al la disvastiĝo de memstara partio: la Fronta Partio.

Kreiĝis flandra naciista partio

En la lastaj balotoj la deputitoj elektitaj je la listoj de tiu partio estis 11. Tio pruvas, ke la spiritoj estas tre prilaboritaj. Kaj kion reprezentas tiu Fronta Partio? La fundo estas katolika kaj estas direktata de la pastroj, malgraŭ la malpermeso de la episkopoj. Sed estas kompreneble, ke tiu partio prenas multajn voĉojn el inter la Laboristaro, ĉar ĉi lasta ĉefe estas interesita en tiu movado. (La burĝoj ne okupiĝas pri tiu lingva afero. Ili povas per mono havigi al siaj infanoj kian ajn instruon.) Kaj ĉu tiu partio defendas la interesojn de la laboristaro? Tute ne! Ekzemple en Orienta Flandrio, kie la katolikoj sukcesis regi absolute dum duona jarcento, kaj kiuj dank' al la Fronta Partio troviĝas nun en malplimulto, tiu sama katolika partio

[1] La legantoj trovos en "Servokapabla" de Georgo Eekhoud, trad. L. Bergiers (eld. ĉe Hirt & Sohn en Leipzig), tiun situacion pritraktita. (L. B.)

daŭrigas sian regadon dank' al la subteno fare de la Frontpartianoj.

Fakto estas, ke tiuspecaj movadoj estas malutilaj al la ĝenerala laborista movado. Oni povas konsenti, ke ĝis nun la flandralingvanoj estis neegale estimataj kompare kun la franclingvanoj. Sed tio ne estas mirinda: la nuna sociordo interesiĝas pri la homoj nur laŭ ilia utileco por siaj celoj. Kaj la sama situacio devas sin prezenti en la aliaj landoj, kie ekzistas pluraj lingvoj, kies unu havas nur mondan relativan valoron. Por la kapitalistaro, oficisto aŭ laboristo franclingva estas pli utila ol flandralingvano. Kaj tiu problemo prilingva devas tamen esti solvata, nur temas kiam kaj kiel.

Persone, mi inklinas je la unuigo de la instruado en unu lingvo. Ĉar mi kredas, ke sola lingvo estas pli interesa por la laborista batalo kaj ankaŭ por la klerigado de la laboristoj. Mi scias, ke tiun solvon neniam akceptos la flandralingvanoj, ĉar okazas ĉi tie, kiel en la problemo pri internacia lingvo, se iu ajn nacia lingvo estus proponita. Eĉ se tiu lingvo estus pli valora ol la aliaj, ĉiuj alilingvanoj rifuzus ĝin.

La solvo de la lingva problemo

Ŝajnas do, ke tiu problemo restos longtempe sensolva. Nur kun la evoluo ekonomia kaj lingva povas estiĝi novaj faktoroj en tiu situacio. Ekzemple solvo estus la akcepto de esperanto kiel helpa lingvo, se la flandralingvanoj konservante sian nacian lingvon lernus esperanton (pli facila ol la franca) kaj la franclingvanoj konservante la francan lingvon lernus esperanton (pli facila ol la flandra). Tiu situacio kreiĝos same kiel en aliaj landoj. Ĉar ĉiuj fortoj ekonomiaj kaj sciencaj kondukas la tutan mondon al la unuigo de la lingvoj. La unua stadio estos la akcepto de iu lingvo, ekzemple esperanto, kiel helpa lingvo, kaj la lasta stadio estos la akcepto de tiu lingvo kiel universala lingvo. Nur tiam la problemo pri naciaj lingvoj estos definitive solvita.

Léon Bergiers (630).

S-ULO ESTAS MAL-PERMESITA

post la malpermesoj en Italio, Litovio, Latvio, Rumanio, Bulgario Hungario — nun ankaŭ

EN POLIO!

Nia respondo estu:

Pli intensigita varbado en la cetera mondo! K-doj! Ŝtopu la truojn ŝiritajn!

Varbu, varbadu senlace por via gazeto!

SPITE ĈIO KRESKU LA ABONANTARO DE "S-ULO"!

La Laborista Problemo en Usono

(3-a daŭrigo. Vidu n-ojn 250—252)

IV.

LA DUNGMETODOJ

Iam la laboristo alvenis la kradon de la fabriko, alvokis la pasantan laborejestron kaj petis de li laboron. Hodiaŭ li sin turnas al dungoficejo. Li, unue, eniras vastan atendejon, komforte kaj kelkfoje elegante meblitan. La estroj opinias, efektive, ke estas dezirinde impresi tuj favore la petantojn, por estigi ĉe ili simpation al la fabriko. Kora akcepto ĉe la dungoficejo estas tiom pli necesa, ke la unua impreso de la laboristo ne estas verŝajne tre favora. La vizitanto ja estas unue akceptata de la pordisto, kiu en multaj fabrikoj (ekz. "Rood Ruller Cie. Cheney Brothers Cie. American Brass Cie." ktp.) estas *policano*, dungita kaj pagata de la kompanio.

Ĉe la dungoficejo skribisto demandas al la laboristo ĝeneralajn klarigojn pri lia personeco kaj pri la laborspeco, kiu plej bone taŭgus al li. Se la petanto ŝajnas serioza kaj rekomendinda laboristo, li plenumas t. n. "application bank", t. e. *dungpeton*.

La dungpeto estas gravega elemento de modernaj metodoj pri dungado, kaj ĝi estis uzata, laŭ statistiko de Keli (Kelly), en 1916 jam en 77,8% de la entreprenoj.

Esplordemandoj al dungotoj

Ĝi esence konsistas el demandaro, kiun devas prirespondi la laboristo. Ĝenerale oni demandas lin pri lia nomo, lia adreso, lia edukado, lia nacieco, lia famili-situacio, la nomoj kaj adresoj de la entreprenoj, ĉe kiuj li jam estis dungata, kioman salajron li ricevis, la kialoj de lia foriro. Sub la titolo "rimarkoj" la oficisto sciigas poste sian ĝeneralan impreson pri la laboristo kaj lia distinga priskribo (pezo, alto, karakterizaĵoj). Tiuj diversaj klarigoj permesas tuje enklasigi la postulantojn preferorde laŭ jenaj reguloj:

1. Laboristo, kies loĝejo estas tro malproksima, ofte malfruiĝos, laciĝos rapide kaj baldaŭ serĉos alian pli proksiman laboron. Estas do preferinde elekti laboriston, kiu loĝas plej proksime.

2. Por kelkaj laboroj, iu nacieco povas esti preferinda al alia. Ekz. usonaj laboristoj plej sukcesas praktiki kvalifikitajn metiojn, la slavoj simplajn kaj lacigajn laborojn; la italoj ĉion, kio postulas lertecon kaj rapidecon. Por eviti strikojn, oni ofte kutimas neniam arigi en la sama laborejo pli ol 10% da samnaciaj laboristoj. Male, oni ofte kunmetas la plej diversajn temperamentojn (italojn kun jugoslavoj, polojn kun litovoj), por konservi la malpacon inter la laboristoj kaj uzi iun naciecon kontraŭ la alia, se okazos striko.

3. Tute male estas preferinde elekti samreligianajn laboristojn. Tiuj viroj, unuigataj per .komunaj kredoj, kore rilatos, kaj pli certa estos kompleta kunlaborado.

4. Ĉar fraŭlo ne havas famili-ŝarĝon kaj facile povas ŝanĝi sian loĝlokon, li ĝenerale aspektos kiel laboristo nerestema, sendisciplina kaj malatenta; male, familipatro, deziranta vivigi la siajn, estos malŝanĝema, disciplina kaj vigle laboros. Tamen, se lia familio estas tro multnombra, lia salajro estos nesufiĉa por permesi, ke ĝi vivu. Li devos sin turni al almozdonantoj, kaj ĉar lia menso estos ĉiam okupata pri la financaj malfaciloj, lia produktokvanto estos pli malalta. Same, edzino estas ĝenerale nerestema, ĉar ŝi nur okaze laboras, kiam la edzo estas malsana aŭ senlabora. La junulino, kiu vivas kun siaj gepatroj, serĉas ĉe la fabriko nur etan mon-aldonon kaj ne tre serioze laboras. Vidvino kun infanoj multe laboras hejme; pro tio ŝi ne sufiĉe produktas. *La plej dezirindaj laboristoj estas do: la patro de ne tro multnombra familio kaj la virino vidva aŭ eksedziĝinta, sen infanoj.*

5. Plej ofte la dungoficisto demandas skribe la antaŭan mastron pri la daŭro de la laboro de l' koncerna laboristo kaj la kvalito de tiu laboro. La plej granda parto da entreprenoj ne konsideras ĝenerale kiel gravaj la respondojn al tiu lasta punkto. Fakte, viro povas esti malbone kutiminta je iu laboro kaj tamen plej sukcese fari alian. Krome kelkaj mastroj ĉiam donas bonegajn informojn, ĉar ili ne volas respondiĝi pri malebligo al viro trovi laboron, eĉ se li malbone laboris dum sia dungiteco ĉe ili. Male kelkaj sisteme senkreditige parolas pri iu, kiu al ili malplaĉis.

Kompiltrad. Alĝeraj Esperantistoj.

(Daŭrigota.)

LASTHORE

La 9. SAT-Kongreso en Leipzig atestis en impona maniero pri la plifortiĝo de nia organizo. Sume anoncis sin por partopreno **1102** *Gek-doj el* **29** *landoj. Fakte ĉeestis* **662** *Gek-doj el* **22** *landoj. El Sovetio ricevis vizon por eniri Germanion nur* **2** *K-doj (Demidjuk k Drezen) el* **12** *vizpetintoj.*

La raportojn prezentitajn de la Plenum-Komitato sekvis akraj atakoj kontraŭ la gvidantaro de SAT kaj precipe kontraŭ K-do Lanti, kiu forte defendis sian agadon kaj ricevis la subtenon de aliaj debat-parolantoj. Fine solviĝis la konflikto, jam minacanta detrui la unuecon de SAT, per formulo restariganta la pacon. Estis akceptata finrezolucio, en kiu la Kongreso esprimas sian fidon al ĉiuj gvidantaj organoj kaj kies teksto aperos en la venonta n-o de "S-ulo".

La aranĝitaj fakkunsidoj kaj specialaj paroladoj pli malpli bone sukcesis. Kongresfilmo povis esti montrata al la kongresanoj antaŭ ilia forveturo.

VOJAĜO AL LONDONO

Ĉu vi ŝatas vojaĝi? Ha, stranga demando, vi eble respondos, kaj vi pravas. Ankaŭ mi pensas, ke nur malmultaj esperantistoj povas esti, kiuj ne dezirus konatiĝi kun aliaj adeptoj de nia tutmonda lingvo loĝantaj sur terpecoj lokitaj ekster la landlimoj al ni fiksitaj. Nu, tio estis jam de longe mia profunda deziro, kiun fine mi povis efektivigi, sukcesante aranĝi vojaĝon al Londono.

Surŝipe

Estis sabato ... En la havenurbo rapidegis la trafikiloj, polvoplenaj estis la stratoj, sur kiujn premis la varmo de septembra suno. Akompanate de kelkaj geamikoj, mi iris al la ŝipo, kiu portos min transmaren al mia celo. Tuj estis ordigata la pasportafero kaj enskribo, kaj post la trovo de mia kajuto sub la malantaŭa ferdeko, tute izolite de la vojaĝantoj de la unua klaso (kompreneble), mi atendis la okazontaĵojn. Ĝuste je la sepa eksonoris la fajfilo. Tien kaj reen rapidis la maristoj. La albordiĝa ponteto estis surŝipigata, falis la ĉeno de l' antaŭa ŝipo kaj jam moviĝis la pinto for de l' kajo. La ŝipo turniĝis sur la Maas, lastaj salutoj eksonis kaj post kelkaj minutoj la unutona bruo de la maŝinoj certigis, ke ni plenvapore maren veturas. Mi okupus tro da loko por priskribi la dumnoktan vojaĝon, kaj pro tio mi limigas min al unu travivaĵo.

Estis jam la dekunua nokte. La plenlunlumo arĝentumis la ondojn. Ĉiuj pasaĝeroj troviĝis sur la ferdeko. Tiuj de la dua klaso en ordinaraj seĝoj kaj tiuj de la unua kuŝantaj en remburoj, la virinoj fumantaj kiel kamentuboj — abomene: mi preferus jaron da punlaboro ol vivi en tia rigida, pompa ĉirkaŭaĵo. Mi promenis sur la malantaŭa ŝipo, kiam mi subite ekvidis malgrandan pordon, kiu kondukis en la internon de la ŝipo. Mi trapasis ĝin; malvasta, tre malpura koridoro, laŭ kies dekstra flanko troviĝis la malgrandaj kajutoj de la hejtistoj, akceptis min kaj kondukis al la maŝinejo. Ankoraŭ pordeton mi pasis kaj ekstaris sur fera ŝtuparo, tra kiu mi vidis profunde sub mi la blankajn moviĝantajn piŝtojn de l' fortega maŝino. Momenton mi ŝanceliĝis, vidante la seriozan rigardon de l' estro, sed tuj mi daŭrigis mian vojon. Post duba demando li permesis mian viziton, kaj kion mi nun ekvidis, mi neniam forgesos. En varmega, polvoplena atmosfero laboris du laboristoj (hejtistoj). Seninterrompe ili ĵetis la nigran nutraĵon en ses malfermitajn truojn, la fajron de la kaldronoj. Riversimile fluis la ŝvito super la duonnudaj korpoj, kaj ili aspektis kiel negroj. Ili apenaŭ havis la tempon, por respondi al kelkaj demandoj, kiujn mi direktis al ili. Respondi ja ankaŭ estis malpermesate al ili. Sen paŭzo ili funkcias kvar horojn, tiam sekvas kvar horoj da ripozo kaj poste denove kvar horoj da laboro ĝis atingo de la celo. Ofte ili estas maldungataj kaj denove dungataj, nur ĉar la sinjoroj entreprenistoj ne ŝatas havi devojn kontraŭ siaj laboristoj kaj la sola pago por vendita laborforto estas malalta salajro. Malseke pro ŝvitado kaj iomete konfuze mi fine reatingis la ferdekon. Profunde mi enspiris la freŝan aeron, sed ĝui la agrablan nokton mi ne plu kapablis. La impreso estis tro forta, kaj kuŝante en la lito mi ankoraŭ devis pensi pri la modernaj sklavoj en la ventro de naĝanta palaco.

La Londona trafiko

D i m a n ĉ o. La vagonaro rapidis tra agrabla pejzaĝo al Londono, kie mi alvenante en Viktoria-Stacio estis kore akceptata de kelkaj SAT-anoj, kiuj ĝoje salutinte min akompanis min tra la urbo. Kia diferenco inter urboj sur la kontinento kaj Londono! La giganta trafiko, la centoj da homoj, kiuj ĉiuminute trapasas la straton sen iu akcidento, kiun mi ĉiumomente atendis. Sed oni povis rimarki, ke la homoj ĉi tie jam de jardekoj kutimiĝis al la rapideco same kiel al la amasa ĉirkaŭiteco, kiun mi rimarkis trapasante la parkojn. Centoj, eĉ miloj da homoj, kiuj plenigas la parkojn dum dimanĉo, tute kontraŭe al la idealo de ni



naturamikoj, kiuj ĝojegas pri la fina alveno de l' dimanĉo por denove vagadi ekster la urbo, ĝui la belecon de l' maro kaj en la trankvilo reakiri novajn fortojn por peza laboro de l' sekvanta semajno. Bonan flankon tamen havas la parkoj en Anglio. Oni estas kiel en aliaj landoj devigataj resti sur difinita vojo, sed oni povas sidi kaj kuŝi tie, kie ĝuste plaĉas al ni.

Karakterizaj vidaĵoj

Vespere ni renkontiĝis en malgranda, sed agrabla kafejo komunista kun la nomo E l V a h i d. Por la unua fojo mi estis en eksterlanda rondo, kies nacilingvon mi ne komprenis, kaj tamen ni vigle diskutis. La interrilatoj estiĝis amikaj kiel inter jam delongaj konatuloj. Estis unu el la plej interesaj vesperoj, kiujn mi travivis ĝis nun kun esperantistoj. Jam estis malfrua horo, kiam fine eksonis la ĝis "la (revido)" de la anglaj K-doj.

Lunde ni vizitis monumenton kaj poste la fiŝmerkaton, — tre interesa, kvankam malpurega loko. Homoj kun larĝaj ĉapeloj el ledo aŭ araba gumo, kiuj balancante portas sur kapo 4, 5, eĉ 6 kestojn plenajn da fiŝo kaj glacio.

Unu el ili rakontis al ni, kiel oni trompas la anglajn patriotajn aĉetantojn, kiuj rifuzas aĉeti germanan fiŝon. La germanaj ŝipoj veturas ĝis malgranda haveno sur la Tamizo, kie oni transŝarĝas la fiŝojn en anglajn boatojn, transportante ilin al la merkato en Londono. Tie oni vendas ilin kiel anglajn aŭ nederlandajn fiŝojn. Bona patrioto, vi havu vian volon. Venante al la "Turo"[1], la malnova fortikaĵo, ni ankoraŭ vidis soldatojn vestitajn per kostumoj el la dektria jarcento. Anglio tre ŝatas ankoraŭ la tradician vestaĵon en soldata vivo. Ĉi tie multaj personoj estas senkapigitaj aŭ bruligitaj dum la mezepoko. Inter ili ankaŭ "Earl of Southampton"[2], la bonvolulo de Ŝekspir kaj la konata Tomaso Morus.

Tombo de Karl Marks

Mi tre deziris ankaŭ vidi la tombon de Karl Marks kaj tial ni aranĝis marde malgrandan ekskurson al Hajget (angle: Highgate). Tre bela loko, alte super la haladzo de l' urbego, kie ni post sufiĉe longa serĉado fine sukcesis trovi la simplan blankan ŝtonon kun la surskribo "Karl Marx 1818—1883 kun edzino."

Simpla tombo, kion vi havas por rakonti al la strangulo, kiu de tiel malproksime alvenis por vidi cin? Ĉu vere estas la grandulo kiun ci konservas en eterna ripozo? Ne, li ne mortis, li vivas kaj li daŭros vivi. La ok homoj, kiuj akompanis lin post mizera vivo al lia lasta ripozejo, estiĝis jam ok milionoj kaj malgraŭ la heroa batalo, kiu ondas ĉirkaŭ la marksismo, marŝas via ideo.

Kun samprofesiano

Alvenis merkredo. La glortago de mia feria semajno. Dank' al Londona K-do mi konatiĝis kun samprofesiano, kiu hazarde estis ankaŭ esperantisto. Li akiris de sia estro la permeson gvidi min tra la bierfarejo, en kiu li laboris. Denove pruvo de la plej diversspeca uzebleco de esperanto. Ĉion li flue klarigis esperante, tradukis miajn parolojn al la anglaj kolegoj kaj ili ĝin denove al mi. Grandan diferencon mi rimarkis inter la labormaniero en Nederlando kaj Germanio kaj tiu de Anglio. Oni laboras malnovmetode, kvankam oni disponas pri modernaj maŝinoj. Tion kaŭzas la cirkonstanco, ĉar la bierproduktado tie ne ludas tiel grandan rolon kiel en Germanio. Interese estas noti, ke ĝis antaŭ la milito oni povis trovi en ĉiuj partoj de la mondo germanajn barelistojn. Tio ŝanĝiĝis dum kaj post la milito. Nuntempe la trinkaĵ-industrio estas truste ligita tutkontinente kaj estas unu el la plej profitdonaj industrioj, kiuj ekzistas.

La parkoratoroj.

Kelkfoje ni promenis dum la vespero en la urbo kaj rigardis la multvariecon de la ĉi tiea vivo. Homplenigitaj parkoj. En unu oni ludas publike teatron aŭ aŭdigas koncerton. En alia, ekzemple en Marbl Arĉ (angle: Marble Arch), la konata pordego en la norda angulo de l' granda Hajd (angle: Hyde)-Parko okazas ĉiuvespere publikaj paroladoj de anoj

[1] Angle: Tower.
[2] Parolu: Örl of Saŭsemptn.

de la plej diversaj politikaj kaj eklezíaj tendencoj. En longa vico staras sur kesto aŭ malgranda ŝtuparo la parolantoj kaj fervore parolas al la grupo, kiu en pli aŭ malpli granda nombro ĉirkaŭas lin. Ĝis la 23-a h., eĉ ankoraŭ pli malfrue daŭras tio kaj poste? Nun poste ankaŭ ne malpleniĝas la parkoj, ĉar ili same kiel la preĝejoj en Londono servas kiel dormlokoj por la senlaboruloj.

"Ŭajtĉepl"

Kaj nun mi skizu ion, pri kio oni ne povas aĉeti poŝtkartojn en Londono. Mi celas la plej internacian lokon de la mondo, la kosmopolitejon nomatan Ŭ a j t ĉ e p l (angle: Witechapel), kie vegetas la "ŝaŭmo" de la societo. Iomete premantan atmosferon oni rimarkas trapasante ĝin dum tago. Videblaj estas nur malmultaj homoj, sed de tempo al tempo oni povas senti la penetrantan rigardon de paro da pikantaj okuloj de malantaŭ kurtenoj. Sed kun la falo de la mallumo ekvivas Ŭajtĉepl. Kaj por scii, kio okazas dum nokto, sufiĉas rigardi la nigran tabuleton antaŭ la policejo, kie estas anoncita, ke lastnokte malaperis virino, ke viro prirabita kaj mortigita estas trovita, ke oni trovis infanon, ke malaperis du knabinoj ktp. Kaj se oni demandas, pro kio ekzistas tia vivaĉo? Nu simple pro tio, ke en nia bela sociordo tre granda parto da personoj, ne sukcesas trovi homindan ekzistadon.

La Brita Muzeo

Notu mi nur ankoraŭ la Britan Muzeon, kaj tie ĉefe la librejon. Eniri la grandan trankvilan halon oni nur sukcesas, se oni povas pruvi, ke oni iel estas studanto. Preskaŭ ĉiuj lokoj estas okupitaj. Tre multe da ĉinoj, japanoj kaj hindoj estas tie videblaj. Ili studas en Anglio kaj poste ili portos orienten la okcidentan kulturon. Karl Marks ankaŭ studis en la Brita Muzeo.

Intertempe alvenis sabato, la lasta tago el miaj ferioj. Mi faris nur viziton al la parlamentejo kaj posttagmeze jam preparis min por foriri. Je la kvina akompanis min triope la bonvolaj angloj al la stacio.

Jam longe antaŭ la adiaŭo oni sentas sin for unu de la alia, nur en la momento de l' ekveturo elfluas ankoraŭfoje la dankesprimoj, reciproka manpremo kaj akompanata de la "ĝis revido en Leipzig" la vagonaro forlasis la grandan halon.

Belega marvojaĝo finis mian "esperantan ferian lernejon".

Hans Garten (10512).

Havinda eldonaĵo de SAT estas

Prologo

Poemaro originala de **E. Mihalski**
64 pĝ. kun titolbildo
Mirinde fluaj k graciaj lirikaj versoj.
Prezo: **0.70** mk. g.
Mendu ĉe **Administrejo de SAT,**
Colmstr. 1, **Leipzig O 27.**

PRI POLA MALDEKSTRA SOCIALISTA PARTIO

Antaŭ 2½ jaroj okazis disrompiĝo en la Pola Partio Socialista, aliĝinta al la Dua Internacio. La disrompintoj fondis la Maldekstran Polan Socialistan Partion. Gvidanto kaj ĝenerala sekretario de la nove fondita partio estis Andjej Ĉuma (pole: Andrzej Czuma), famkonata aganto por la laborista afero kaj tre ŝatata de ĉiuj laboristoj en sia regiono (Krakovo-Zaglembia-Ĉeĥovice). La sciiĝo pri l' fondiĝo de la nova partio disvastiĝis fulmrapide tra la tuta lando kaj en ĉiuj urboj kaj urbetoj tuj fondiĝis rondoj el simpatiantoj.

La revoluciemaj devizoj kaj la sincera batalpreteco de P. P. S. Maldekstra logis al ĝi tre grandajn amasojn el la pola laboristaro. La partio kreskis de tago al tago kaj eldonis propran presorganon "Robociarz" (Laborulo), kiu estis disvendata en ĉiuj anguletoj de la lando. La influo de la Partio inter la pola laboristaro des pli evidentiĝis dum la pasintjare (4. marto) okazintaj balotoj al la parlamento. La P. P. S. Maldekstra montris tiam al la laboristaro, ke ĝi ne estas partio de disrompantoj de la laborista unueco kaj ne elstariĝis propran balotliston. Ĝi kuniĝis sin kun la plej revoluciemaj partioj, ne atentante, ĉu ili estas neleĝaj kaj persekutataj de la faŝisma registaro.

La rezulto de la balotoj estis sukcesplena. En Varsovio la listo de la "Laborista Unueco" (Kompartio k P. P. S. mald.) ricevis ĉ. 75 mil voĉojn, 2 mandatojn (antaŭe 1 m.), en Lodz — ĉ. 50 mil voĉojn, 2 mandatojn (antaŭe 14 mil v., 0 m.), en Zaglembia Dombrovskie — 3 mandatojn (antaŭe 1). En la tuta lando la listoj de la revoluciema proletaro ricevis ĉ. 1 milionon da voĉoj (antaŭe ĉ. centmil).

Nun la faŝismo ekvidis antaŭ si tre danĝeran malamikon kaj la persekutoj kontraŭ la maldekstra P. P. S. tuj komenciĝis. Arestoj okazis tra la tuta lando. Oni enkarcerigis la plej agemajn partianojn pro "kontraŭŝtata" agitado. La presorgano "Robociarz" komencis aperi malregule. Konstantaj konfiskadoj, monpunoj kaj malliberigo de l' redaktanto malebligis ĝian regulan aperadon. Tamen la partio kreskis pli kaj pli. La lastaj balotoj okazintaj por la urbkonsilantaroj kaj malsan-kasoj en diversaj urboj elmontris tion tute reliefe (Lublin, Pabjanice). Tio verŝajne estis la kaŭzo de l' persekutoj kaj subpremoj, kiuj plifortiĝis lastatempe kontraŭ mald. P. P. S.

Estas nun tute klare, ke la faŝista Pilsudski-registaro intencas disrompi la partion. Por tiu celo ĝi fiaĉetis al si por judasaj moneroj kvar perfidulojn, kiuj eniĝis en la C. K. de mald. P. P. S. kaj penis fari la disrompon. Sed iliaj intencoj fiaskis. La gardemaj partigvidantoj rapide ekkonis la celon de la perfidema kvaro kaj ilin tuj forigis de la C. K. kaj de la partio.

La registaro, vidante, ke la partio estas tro forta por ĝin disrompi de interne, penas ĝin detrui per aliaj rimedoj. Ekzemple, senmotive estis fermita la ejo de l' partio en Varsovio kaj la loka komitato arestita. Laŭ la burĝa gazetaro la varsovia organizo havis interrilatojn kun la Tria Internacio. Senmotive oni arestis antaŭ du monatoj ankaŭ la ĝeneralan sekretarion K-don Ĉuma en Krakovo. Ĉiuj ĉi K-doj troviĝas ankoraŭ ĝis nun en la malliberejo. Same oni arestis dumnokte la prezidanton de C. K. kaj parti-prezidanton en Lodz, K-don Fr. Polka. Nun la tuta C. K. jam troviĝas malantaŭ la kradoj de malliberejo. Krom tio la registaro aplikas tre hontindajn rimedojn.

Antaŭ kelkaj semajnoj oni arestis la prezidanton de l' junular-sekcio de P. P. S. M. en Lodz, kiu estis morte batata, ĉar li ne volis subskribi, ke li aliĝas al la "Ligo de Komjunularo en Polio". Ankaŭ okazis subitaj traserĉoj en la loĝejoj de la plej agemaj partianoj en Lodz, kie oni "trovis" (legu: — trovigis subjete) "Ruĝhelpajn" listojn por kolekti monon, kaj tio sufiĉis por ilin aresti. Oni arestis i. a. kelkdek K-dojn, kiuj ekskursis el Lodz al Languvek. Ĉiutage ni sciiĝas pri novaj arestoj en la tuta lando. Por havi bildon, kiel la arestitoj estas turmentataj en la "defenzivoj", sufiĉas rememori la mezepokajn inkviziciojn. Por priskribi la turmentrimedojn, kiujn aplikas la faŝistaj banditoj, necesus multe da loko.

Tial estas tute ne mirige, kial oni tiel ofte aŭdas pri memmortigoj kaj malsatstrikoj de politikaj malliberuloj.

Sapyr Alih.

★

"Porrikolta milito" en sovetia vilaĝo

Niaj nordrusaj kamparanoj terkulturas nun, kiel antikvatempe. Ili havas ĝis nun trikampan sistemon. La kampon ili disdividas je 3 partoj: sur la unuan ili semas sekalon, sur la duan — someran grenon (avenon, hordeon, terpomon, linon ktp.), kaj la tria restas nesemita kaj kovriĝas de herbo (kompreneble, tre malbona herbo) kaj estas nomata: "par". Sur la "par" somere oni paŝtas la brutaron.

Niaj iloj por terkulturo estas senrada plugilo (ofte ligna, farita de kamparano mem kaj nomata "soĥa") kaj erpilo, same ofte ligna ("boronà"). Oni rikoltas per rikoltilo ("cep" aŭ "privjaz"), — longa kaj mallonga bastonoj, kunligitaj per rimeno, kaj eĉ ventumas ordinare per ligna ŝovelilo ("lopàta") kaj ventumilo. Tial rikoltoj okazas trioblaj, kvaroblaj ktp. Maŝinojn oni uzas tre malmulte: la kamparanoj estas malriĉaj kaj tre malkleregaj.

La soveta registaro ĉiam penis klerigi la kamparanojn kaj pliatigi la rikoltokvanton. Ĝi havis sukceson. Ekzemple, antaŭ la revolucio, preskaŭ ĉiuj terkulturistoj en mia vilaĝo havis lignajn, hejme faritajn plugilojn; nun preskaŭ ĉiuj jam havas plugilojn aĉetitajn, laŭ eŭropa modelo (nur senradaj). Pasintjare mia vilaĝo ŝanĝis la trikampan sistemon por la 5-kampa. Sed nunjare ni havas plifortigitan "porrikoltan militon".

Kiel scias ĉiuj legantoj, nunjare pro malbona somero preskaŭ en tuta eŭropa parto de Sovetio okazis tro malbona rikolto. Tio ne okazus, se la terkulturistoj laborus pli racie kaj klere. Krome ni povas observi la malplialtiĝon de l' rikolto pro diversaj aliaj kaŭzoj: plimultiĝo de l' loĝantaro, elmigrado de l' kamparanoj en urbojn, malgrandiĝo de diversaj mastrumoj (nune multaj disdividas siajn mastrumojn, malgraŭ la porkolektiva propagando!), malaperigado de bienoj ktp. Kompreneble, se ni estus pli kulturaj, ĉiuj tiuj kaŭzoj (krom malgrandigo de mastrumoj) ne estus tiel danĝeraj kiel nun.


Vilaĝanoj en Norda Sovetio

La regiona plenumkomitato de l' sovetoj aranĝis nunsomere kelkajn terkulturajn kursojn: por la vilaĝsovetaj prezidantoj, por komjunuloj kaj vilaĝaj aktivuloj, por kleriglaboruloj (instruistoj kaj legejestroj). Estis dissenditaj la dekretoj de l' distrikta plenumkomitato pri deviga ventumado, la greno semota per disspecigmaŝinoj (kie ili forestas, la regionkomitatoj devas ilin doni provizore) kaj aliaj plibonigoj de l' semado. La tuta aktivularo estas alvokata helpi la registaron en ĉi tiu afero. Ni (geinstruistoj) faris multajn raportojn pri


Rikolto. Grafiko de V. Kasjan

terkulturaj temoj en nia kaj najbara vilaĝoj.

Nun preskaŭ ĉiuj kamparanoj en Doriŝĉi, havantaj propran avensemon, maŝindisspecigis ĝin. Multaj nunjare unuafoje alveturigis el la fabriko cindron por la kampo, kiel ternutron. (Ĝis nun preskaŭ neniu tion faris, kaj la cindro putris senutile en kavegoj.) Preskaŭ ĉiuj aĉetis kalkon por la sama celo. Por plibonigi la ŝafaron, la vilaĝanoj aĉetis kolektive bonspecan "romanovan" ŝafviron. Kaj kiel eksperimenton, la vilaĝaninoj, gvidataj de mia kolegino, decidis nunjare organizi kolektivan legomplantejon. "Nur kolektiva terkulturo povas esti bonprospera", — diras nia registaro.

La lernejo same celas helpi la terkulturon. Mia lernejo havas 1 hektaron da kampo, sed, bedaŭrinde, mi ne scias ankoraŭ, ĉu mi povos ĝin uzi, ĉar ĝi ne estas barita, kaj la regionkomitato ne donas monon por tio. Se la kamparanoj mem konsentos bari senpage — ni laboros; se ne — la kampo nunjare ne povos esti uzata. Krom tio, ni kun la gelernantoj pristudas la racian terkulturon. Por batali kontraŭ malutilaj insektoj, la gelernantoj pendigas ĉe la lernejo kaj hejme sturnodomojn (en nuna printempo tion faris 25 gelernantoj, kaj ili pendigis 92 sturnodomojn). Kiel eksperimenton, ni organizas la konkurson: kiu el la gelernantoj alportos aŭtune la plej grandan brasikkapon. Okazos ekspozicio, en kiu junaj legomistoj raportos al plenaĝuloj, kiametode ili povis ekhavi grandajn brasikkapojn. Por tio nun ili pristudas la racian brasikplantadon.

Tiel pomalmulte ni batalas por bona rikolto.

Nikolao Usov, Vilaĝo Doriŝĉi, Leningrada provinco, Sovetio.

Pri "Popolaj Domoj" kaj similaĵoj

En n-o 243 de "S-ulo" K-do 11 082 plendis pri fuŝo de sialoka popoldomo, kiu fariĝis tute burĝa gastejo malinda je siaj nomo kaj celo.

K-do 11 082 tuŝas tre gravan problemon. Ĉu la socialismo estu nura ekonomia ŝanĝiĝo aŭ ĉu ĝi signifu ankaŭ novan, alian kulturon? Iuj marksistoj eble asertas, ke aliaj ekonomiaj cirkonstancoj kondiĉas nepre ankaŭ alian kulturon. Oni estu singardema. Por granda parto de niaj laboristoj socialismo signifas bone manĝi, bone trinki, multe da distroj, unuvorte: s i g n i f a s v i v o n d e l a h o d i a ŭ a b u r ĝ a r o.

Tial oni bonfartas en tiaj "popoldomoj", kie nenio memorigas, ke oni estas proleto, kie oni estas kvazaŭ "sinjoro". Tial oni klopodas imitaĉi la burĝon laŭ vestoj, laŭ la loĝejo, laŭ multaj aliaj ĉiutagaj aferoj. Laboristaj gvidantoj, kiuj burĝece kondutas, estas de la samaj homoj atakataj. Sed kiu el ili agus en simila situacio aliel?

Nur eta parto da laboristoj (mi laŭde menciu K-dojn inter la "Naturamikoj" kaj socialista junularo) penas venki la burĝon, la filistron en si mem kaj vivi laŭ nova, hominda, socialista maniero. Kuraĝe ili forĵetas regulojn pri burĝa societo, vantecon pri parolo kaj vestoj, fikutimojn, hipokritan seksmoralon. Jam verkas proletaj aŭtoroj pri vivo de la laboristoj, proletaj aktorgrupoj tramigras la landon, parolhoroj prezentas suferojn kaj liberecsopiron de la amasoj, kunvenoj okazas sen alkoholo, sen fumado, honesta konduto laŭ vortoj kaj agoj disvastiĝas.

Ni, sennaciuloj, revoluciaj pioniroj, kunhelpu plifortigi la vicojn ankaŭ de la pioniroj por proleta kulturo!

G. Nicŝe, Chemnitz (Germ.).

Sur Patriotaj Batalejoj

Naturamika festo sur Ŝnepfenrid[1]

14-an de julio okazis inaŭguro de naturamika hejmo de la grupo Kolmar (Elzaso). Kvankam mi loĝas malproksime de tiu loko, tamen mi volis partopreni ĉi tiun feston. Jam sabate vespere mi devis forveturi de mia loĝloko al Strasburgo, kie mi tranoktiĝis ĉe naturamika K-do. Jam antaŭ la kvara horo ni ellitiĝis kaj rapidis al stacidomo. Ebriuloj faletante forlasadis la gastejojn, kie kelkaj eble fordrinkis dum unu nokto la duonan salajron de tuta semajno. Multaj ankoraŭ kantaĉis kaj dancis. Ni rapidis por malaperigi tiajn abomenajn bildojn.

Je la 5-a horo ni forveturis de Strasburgo per porekskursa dimanĉ-vagonaro. Dum la veturado ni konatiĝis kun germaniaj kaj svisiaj naturamikoj, delegitoj al nia festo. Je la 7-a horo ni forlasis la vagonaron en Metzeral. Tuj ni povis rimarki, ke tie antaŭ 11 jaroj furiozis porpatriaj bataloj. La tute novkonstruitaj vilaĝoj kaj ankaŭ kelkaj domruinoj, detruitaj arbaroj kaj soldat-tombejoj tre bone atestis pri la okazintaĵoj. Post duhora marŝado ni atingis nian belan domon. Kelkcentoj da naturamikoj jam kuŝis tie sur la herbejo en arbaro aŭ promenis en la ĉirkaŭo.

La domo estas bele lokita apud arbaro; ĉirkaŭas ĝin paŝtejoj, — tre bona loko por skiveturado dum la vintro. Ĉirkaŭe estas ankaŭ kelkaj fromaĝfarejoj kaj turistaj domoj de burĝaj turistunuiĝoj. Ĉar la 14-a de julio estas ŝtata festotago, ĉie flirtis naciaj flagoj trikoloraj. Nur ĉe la naturamika domo estis ruĝaj flagoj kun naturamika insigno.

Je la deka horo komenciĝis la malfermo de la festo. Parolis delegitoj el Germanio, Saarlando kaj Svisio. Ĉiu parolinto akcentis, ke la naturamikoj devas kunhelpi detrui la landlimojn, kaj ĉiu finis sian paroladon per la vortoj "For la militon, for la landlimojn!" Bedaŭrinde inter la delegitoj troviĝis neniu esperantisto ne scipovanta la germanan lingvon. Ĉar estis la plej bona okazo por pruvi, ke sen la komuna lingvo ne ĉie estas eble ignori la landlimojn.

La landlimoj inter Elzaso-Lotaringio kaj Francio foriĝis jam antaŭ 11 jaroj. Sed ankoraŭ ekzistas altaj baroj inter elzasa kaj franca proletaro. Tiujn barojn nur povas ignori ni esperantistoj, kaj ni devas ankoraŭ doni al niaj klasorganizoj tiun rimedon por venki la lingvajn barojn.

Mi jam nun sciigas al naturamikoj kaj interesuloj, ke proksiman jaron ree okazos tia festo en la Vogez-montaro kun inaŭguro de naturamika domo sur Frécourupt (Frekurü'). "Monton liberan!"

(4671)

[1] Germane: Schnepfenried.

Piedpilkludo — la ĉefa distro en Britio

Aprobante artikolon de SAT-ano 10089, kiu aperis en "S-ulo" n-o 240, mi decidis alproprigi al mi la enhavitajn sugestojn kaj priskribas tial la ĉefan distron de la brita laboristaro, nome la piedpilkludon[1].

Imagu malluman novembran posttagmezon, sabate, en vasta industria urbego (ekzemple Glasgoŭ, angle: Glasgow). Jam silentis la sonorilaro, kiu anoncis la tagmezan laborĉeson por la grandaj ŝipkonstruejoj kaj cetera fabrikaro. Kaj nun, je la 14-a horo, aperas surstrate purigitaj, bone vestitaj gelaboristoj multnombre. Kelkiuj iras piede, sed la plimulto trame veturas al la piedpilkludejo. Ĉar ĉiu tramo tial estas tro plenigita da tiaj sport-entuziasmuloj, estas konsilinde pasi la vojon piede. Dume la kunfluanta amaso fariĝas pli kaj pli densa. Fine estas videbla la ekstero de l' ludejo.

Tie jam miloj da rigardemuloj batalas pro la eniro. Penege specialaj policaj taĉmentoj, rajdante kaj piede, vicigas kaj samtempe gvidas la baraktantan amasegon eniren, kie por 1 ŝilingo (= 0,25 dol.) por plenaĝulo kaj 6 pencoj (= 0,12 dol.) por junulo estas havebla tribunloko.

Interne sur la vaste etenditaj tribunoj jam amase sidas la gelaboristoj. Iufoje muzikistaro amuzas la senpacience atendantan rigardontaron, kaj ĉe ludkomenco ne restas unu sola vaka tribunloko. Ofte pli ol cent mil piedpilkentuziasmuloj ĉeestas unu solan piedpilkludon ("match").

Tuj je la 15.30-a h. anonciĝas la ludkomenco per amasega voĉbruado, kiu daŭras senĉese ĝis la ludfino. Ekscite instigataj de la ludo, multaj inter la rigardantoj eksuprenĵetas la ĉapelojn kaj eĉ malplenajn trinkujojn, botelojn ktp., kaj ofte portempa ludinterrompo okazas pro multaj perpugnaj bataloj. Ĝenerale la konduto de la rigardantaro estas tiel amuza kiel malplaĉega. Dum la ludado ekstere preskaŭ ĉe ĉiu gazetvendejo estas radie disaŭdigata la ludprogresado. Kaj tie la senmona senlaborularo kontentigas sin. Tiam je la 17-a, post 2½-hora ludado, la decidanta fajfo ĉesigas la ludon. En tiu momento ekkomenciĝas bruegado. La vastamasa homa svarmo ekmoviĝas elirejen. Multaj el la rigardantoj kojnigitaj de la amaso estas forportataj tra la elirejo, per la piedoj ne tuŝante la teron. Ĉiam ambulanco atendas kaj la sanitara personaro estas plenokupata precipe pro svenatakoj inter la elirantoj. Hejmen irante oni aŭdas jam la ĵurnal-vendistojn laŭte elvokantaj la fakton, ke la vendotaj ĵurnaloj enhavas la rezultojn de multaj piedpilkludoj okazintaj ĉi tiun sabaton tra tuta Britio.

Nature multege da interparoloj kaj disputoj daŭras, ĝis la sekvonta sabato anoncas pliajn piedpilk-batalojn. Kompreneble tiu piedpilk-ludado treege plaĉas al la bienposedantaro, kiu memvole helpe kaj influe subtenas ĝin, bone sciante, ke dum la laboristaro permesas al si tian piedpilk-ludadon, la cerbumado estas prokrastita kaj la venonta revolucio okazos ankaŭ nur en nedifinita tempo.

Antaŭ ol mi finas mian artikoleton, mi diru ion pri la ludantoj aŭ — pli precize dirite — la ludistoj, kiuj estante profesiaj, ricevas altajn salajrojn kaj akiras pli multe ol laboristo. Ofte ankaŭ la ludkapableco estas aĉetata aŭ kapabluloj estas interŝanĝataj de unu piedpilka klubo kun alia por miloj da anglaj funtoj. Estas klare videble, ke en la sporto en Britio la gelaboristoj ludas la rolon de l' rigardantoj.

William Cowan (10085),
Isle of Man.

1 La aŭtoro uzas multe la formon "futbalo", kiu fakte trudiĝis ĉie en la naciajn lingvojn. Sed ni ne volas decidi pri la uzindeco de tiu formo. — Red.



Fumado inter virinoj kaj junulinoj

Kuracisto el Novjorko, D-ro Barber, deklaris, ke almenaŭ 60% de l' infanoj, kiuj mortis antaŭ la dua vivjaro, naskiĝis de patrinoj, kiuj kutimiĝis al fumado. Alia kuracisto elmontris, ke laŭ natura leĝo pro la fumado difektiĝas la naskoĉeloj kaj pro tio la infanoj estas pli malfortaj ol la normo. Tiu certigo devigas min averti la Gek-dojn. Estas la nescio pri tiaj faktoj, kiu kaŭzas plej grandajn perdojn. En laborista familio dum pluva dimanĉo patro, patrino kaj filino sidas hejme — fumante. Ĉie estas same. Antaŭ nelonge mi faris enketon ĉe 372 virinoj inter 12 kaj 55 jaroj. Jen la respondoj al la 4 demandoj faritaj: Respondis jese al 1. Ĉu vi fumas kutime — 10; 2. Ĉu vi fumis, sed ne plu — 33; 3. Ĉu vi fumas iomete — 125; 4. Ĉu vi neniam fumis — 204.

Tiel aperas, ke 45,1% fumis(-as), t. e. difektis(-as) sian sanon, sian patrinecon, tiel ke sekve de tio iliaj infanoj dumvive suferos je subnorma sano, ke pli ol normo mortos dum la unuaj vivjaroj. Ĉu tio ne devus sufiĉi por ni batali kontraŭ la fumokutimo?

Laŭ "Vegetarische Bode", I. F.

La komuneco de lingvo estas grandega forto por tiuj, kiuj ĝin posedas.
Meje (france: Meillet).

Turkestan-Ĉumhurijat[1]

Skizo de Demetro Albanov

Tram-ta-ta ... tram-ta-ta ...

Ie inter montetoj ekbruis la vagonaro, transkuris la limon inter Eŭropo kaj Azio kaj profundiĝis en senfinajn stepajn spacojn.

Sablaro. Tie — valo, alie — mizera kelkio da liliputaj senverdaĵoj, arbetoj kaj denove stepa, senlima, lacige unutona spaco.

La vagonaro kuras. Senlace interbabilas la radoj; preterŝoviĝas etaj kaj solecaj stacioj — gardantoj de stepa senhomo kja senparolo. Ĉe la stacioj preskaŭ forestas homoj, — la vagonaron renkontas staciestro sola. Pasaĝeroj ĝojas eĉ per tia distriĝo kaj nekutime atente okulfiksas lin, sed la soleca homo ŝajne heredis ursan malsociemon, — li rapide aranĝas diversajn pluirajn aferojn de la vagonaro kaj igas ĝin tuj pluiri.

Tago-nokton kuras la vagonaro, — ĉiam la sama restas la pejzaĝo: sablaro, senhomo, senvivo.

Ni kutimiĝis al bruema, maŝinigita funkciado de la nuntempo. Ni kutimiĝis sufokiĝi pro troa malvastaĵo de urboj, grimpi per etaĝoj al la ĉielo pro manko de spaco, — tial stranga estas por ni sovaĝa naturo, senhomaj spacoj, glata neorganizita terebenaĵo.

Ĉu regas, do, iu tra tiuj ĉi vastaĵoj? Mankas homoj. Ŝajne ne troveblaj ili estas ĉi tie, ĉar ĉi tie estas regno de sablaroj, kaj eĉ domaĝaj kreskaĵetoj per sia malsana aspekto atestas, ke ili vivas sole pro miriga instinkto de l' vivo, sen ajna favoro de la naturo.

Sed la homo scipovas adaptiĝi, tial li loĝas eĉ ĉi tie. En malproksima antaŭo aperis lia ejo kaj alkuris, alŝoviĝis renkonte al la vagonaro.

Estas loĝejo de kirgizo: ronda lignaĵa korbsimila ostaro, ĉirkaŭvolvita per krudaj lanaj tapiŝoj kaj matoj, ligitaj per ŝnuroj al la ostaro; konusforma tegmento kun truo ĉe l' pinto por ellaso de fumo.

La kirgizo estas altkreska, larĝvangosta, inklina grasiĝi, proksima parenco de mongola gento. La popolo tre poeziema, muzikema kaj gastema kiel ĉiuj stepuloj. Bagatela afero por ĉiu estas rajde galopi kelkajn dek-kilometrojn simple por rakonti al "najbaro" freŝan novaĵon. Estas tre scivolema kaj kapabla la popolo, tamen tre malklera; kredo je diversaj superstiĉoj kaj diablaĵoj estas tre granda, tial ekz. oni preskaŭ ne konas kuracistojn, kaj ĉiuj malsanoj estas kuracataj per sorĉado kaj diversaj barbarj rimedoj de iu loka sorĉisto. Furiozas malsanoj. La socirilatoj estas reguligataj per "adat" - kutima leĝo: la lasta tre malhelpas al ĉiu progresemo, ĉar ĝi donas pretajn regulojn por ĉiuj fenomenoj de la vivado kaj ne toleras novaĵojn. La homoj loĝas dividitaj per longaj distancoj; ĉefa ilia havaĵo estas brutaro, — ĉefa okupiĝo — paŝtado de tiu brutaro. Tial ili ĉiam ŝanĝas lokojn serĉante novan pli freŝan herbon. Kiam venas la tempo, oni rapide forligas matojn kaj tapiŝojn, demetas lignaĵan ostaron de la loĝejo, ŝarĝas per ili kamelojn kaj la tuta familio rajde vojaĝas ien, kie troviĝos kontentiga nutraĵo por la brutoj. Lokŝanĝemo determinas ĉiujn karakterizajn trajtojn de tiu du- kaj kvaronmilitona popolo.

Tram-ta-ta ... tram-ta-ta ...

Kuras pluen la vagonaro.

Malgaja nudeco de la stepoj iom post iom ŝanĝiĝas. Aperas kulturitaj kampoj, riĉkronaj ĝardenoj, argilaj, plattegmentaj vilaĝoj. Ankaŭ homoj vidiĝas, multkolore vestitaj, sunbrunigitaj, sed ne tiom larĝvangostaj kiel kirgizoj. — Uzbekio ...

1 Turkestano-Respubliko.

DISKUTEJO

PRI LA SEKSA TEMO

Ni ricevis pri la seksa temo kaj pri la demando: "Kia devas esti mia edzino?" tiom da diskut-artikoloj, ke estas neeble aperigi ilin ĉiujn en "S-ulo". Sed ni almenaŭ volas konigi resume al la legantoj la esencajn punktojn kaj opiniojn el ĉiuj manuskriptoj, kiujn ni ricevis. Tiel ankaŭ la verkintoj havos iel sian kontentigon. Ni kontentas konstati, ke per tiu ĉi diskuto ankaŭ tre maloftaj kunlaborantoj ekprenis la plumon kaj turnis sin al la SAT-anaro. Kaj la rezultoj el tia diskutado en nia tutmonda skalo certe ne estas malbonaj. Per tiu ĉi publikigo ni fermas la diskuton pri ĉi tiu temo. Red.

K-do N. Barmin (14 663), Sebastopol, Sovetio, opinias, ke geedzoj kun diferencaj karakteroj kaj opinioj neniam povas pasigi harmonian kaj feliĉan kunvivadon. Se la edzo havas intereson pri sporto kaj la edzino ŝatas preĝejon kaj ĥorkantadon, ili serĉas vivi ĉiu en sia medio, kreas al si rondon da novaj gekonatuloj, kaj komenciĝas tiel miskomprenoj; poste venas ĵaluzo, finfine larmoj, insultoj, eksedziĝo. Firman fundamenton de la amo formas unu celo, unu spirito, unu konvinko en la vivo ĉe ambaŭ geedzoj. Naciecaj diferencoj kompreneble ne devas ludi rolon (kvankam lin interesas pli multe amerikaj kaj italaj belulinoj, kun kiuj li dezirus korespondadi[1]).

K-do N. Pargaĉevski (11 746), Sovetio, kontraŭdiras la eldirojn de K-do Paped en n-o 238 pri "seksa demando k sennaciuloj". Al ties diro pri "anoncoj fremdaj al nia ideologio, malproksimaj de proleta etiko" li rimarkigas: Ĉu la etiko jam estas firme fiksita? Li opinias, ke nenia etiko, nenia ideologio povas malpermesi al proletoj aranĝi sian seksan vivon laŭ sia propra deziro. La sola etikpostulo ĉi-rilata estas, ke la viro kaj la virino estu tute kaj ĉiusence egalrajtaj. Pri "senutila amindumado" li rimarkigas, ke edziĝintoj kaj edziĝontoj ne mankas en SAT-anio kaj la aranĝado de l' propraj (individuaj) aferoj ja ne malhelpas al ili aktive laboradi por la komuna bono.

K-do Peraire Lucien (9344) en Kazan, Sovetio, opinias laŭ la okazinta diskutado rajti konkludi, ke en SAT-anio ekzistas ankoraŭ multaj homaj bestoj. Li opinias necese per klerigado malfermi la okulojn al multaj pri la seksa temo. Li diras, ke li suferis, kiam li legis en "S-ulo" tiun plorindan polemikon pri praveco aŭ malpraveco de seks-temaj korespond-anoncoj. La laborista klaso ankoraŭ ne estas tro edukita kaj konscia. Sekve li prezentas al la Kongreso tiucelan proponon pri seks-edukado ĉe SAT.

K-do 9618 (Francio) opinias, ke beleco de virino havas sian valoron, sed ke tiu punkto tute ne gravas esence kaj ke vere indan homon nur animaj kaj spiritaj kvalitoj povas influi. Viro, kiu posedas malbelan edzinon, tamen povas kredi ŝin bela, eĉ la plej bela. Ni ne estu hipokritaj. Ĉiu K-d(in)o havas malbonan kvaliton aŭ malvirteton. Elektante kunvivanton, oni klopodu reciproke forigi siajn mankojn.

K-dino 2055 (Germanio) opinias, ke K-do Kozako ne pripensis la seksan diferencon, kaŭzatan de la seksaj organoj, ke neniam la seksoj estos samspecaj, sed nur samvaloraj. Ŝi konsentas, ke seninfana edzino laboru, sed ke estas malutilo por la infano, se la patrino faras eksterdoman laboron. Ankaŭ la kuirado (almenaŭ en Germanio) devas esti sciata de la virino. Daŭra manĝado en restoracioj estas tro kosta. Ŝi deziras havi kiel edzon SAT-anon, ateiston, en politiko ne fanatikan, kiu estas migrulo, aprobanto de nudkulturo, nedrinkanto, nefumulo. Ŝi ĝojus, se li dezirus al si infanon kaj li devus esti bona patro. Beleco ne gravus. Ŝi ne volus esti sklavino de la viro nek sklavigi lin.

K-do Fedorovski (13059), Sovetio, opinias, ke la geedzoj en eduka, klereca grado ne devas malegali, ke klera viro ne devas edziĝi kun vilaĝanino, se li volas havi trankvilan, feliĉan edzecan vivon. Mono necesas por feliĉa edziĝo. Homoj, kiuj estas sen financa bazo aŭ ne havas sian laborforton kiel enspezfonton, ne pensu pri edziĝo.

K-do 7214 (Sovetio) opinias, ke tute ne estas peko, se iu fraŭlo intencas edziĝi nur kun fraŭlino havanta samajn kvalitojn kiel li mem. Estas diferenco inter la amo al subulino, amo kun nuanco de malestimo kaj kompato, kia estas nur seksa amo, — kaj amo bazita je egalrajteco kaj reciproka estimo. Estante mem edzo, li solvis la problemon tiel, ke lia edzino laboras mem kaj estas ekonomie tute sendependa. Ili ne registris sian geedziĝon nek ĉe pastro, nek ĉe ŝtata registrejo kaj ne ŝanĝis siajn familinomojn. Estonta infano portos laŭ ilia interkonsento unu el la familinomoj: filo — ŝian, filino — lian.

K-do 7658 (Aŭstrio) opinias, ke tute ne estas krimo laŭ hodiaŭa vivmaniero, se iu viro persistas, ke la edzino estu same sportulino kiel li. Ke li ankaŭ havis amatinon, sed ŝi timis deklivetajn vojojn, kondukantajn supren eĉ nur sur

[1] Bedaŭrinde italaj belulinoj ne povos ekscii pri la deziro de K-do B., ĉar "S-ulo" ne povas eniri en Italio! — Red.

La uzbeko diferencas de l' kirgizo ne nur per sia aspekto — ankaŭ per la teniĝo. Ĝi estas sindetenema. Malvigla, vortavara homo, — cetere tio estas nur ŝajnaj trajtoj altruditaj per "ŝariat" — kutima leĝo de uzbekoj. Se kirgizoj estas relative indiferentaj pri la religio, uzbekoj ofte estas fanatike religiemaj, obeigantaj ĉiujn siajn agojn, ne nur sociajn, ankaŭ familiajn kaj morarajn, al la ordonoj de "ŝariat".

Pastroj, popolaj sanktuloj, religiaj predikistoj, dervIŝoj, eĉ simple iuj scipovantaj legi ian religian libron — ĝuas tre grandan influpovon je la popolo. Ĝi estas ĉefa kialo de la popola malklero kaj malprogresemo. "Ŝariat" antaŭskribis ĉiujn formojn de homaj rilatoj, de ilia agado kaj kunvivo; ĝi antaŭtaksis ĉiujn eĉ malgravajn fenomenojn de la vivo; ĝi donis nedetrueblajn formulojn, — tial ĝi forigis eblecon de memagemo, iniciatemo, progresemo. Influo de "ŝariat" estis precipe konservativa rilate la virinon. Laŭ ĝiaj ordonoj la tuta vivo de la virino estas subigita al volo de la viro-edzo; permesita estas aĉeto-vendo de ŝi kaj posedo al ŝi kiel al objekto; forprenitaj de ŝi estis ĉiuj rajtoj de memagemo; eĉ ŝia vizaĝo estis kovrita per vualo, por ke fremda viro ne povu ĝin vidi.

Kiel jam estis notite, la sindetenemo de l' uzbekoj estas nur ŝajna trajto kaj ili estas amatoroj de ĉiuj festoj, promenoj kaj tumulto. Ŝatata loko de la tempopasigo estas bazaro, kie en multnombraj te-trinkejoj ili estas pretaj resti dum tuta tago, interparolante, aŭskultante muzikistojn, kantistojn kaj scivoleme observante fokusistojn (? Red.) aŭ atentante ian predikon de eklezia oratoro. La loĝejoj de l' uzbekoj estas dividitaj je du partoj — vira kaj virina. Fenestroj kondukas en korton, la domo mem de strato estas barita per alta muro; tial la stratoj similas longegan argilan koridoron. En korto estas konstruitaj ĉiuj mastrumaj ejoj, ankaŭ akvoproviza baseno kaj elargila tablo, por ripozo kaj te-trinkado somere. En la domo preskaŭ mankas mebloj; argila planko estas sternita per kana mato, aŭ per tapiŝoj — en pli bonhavaj domoj. En muroj estas aranĝitaj niĉoj, kien oni starigas kofrojn, rulaĵojn el litkovriloj kaj kusenoj kaj te-manĝilaron — kupran kaj fajencan. La niĉoj estas kurtenitaj per grandaj broditaj tukoj. La vestaĵo de l' viroj konsistas el riĉe pentritaj ŝtofoj katunaj aŭ silkaj, depende de l' bonhavo, — virinoj male portas grizan supran vestaĵon, senmanikan, similan al mortovesto. La tolaĵo ĉe ambaŭ seksoj estas pentrita; la virinoj krom ĉemizoj portas ankaŭ tre longajn, ĝis maleolo, pantalonojn.

Grandaj urboj similas ian fabelan bildon pro ĉiama tumultego de pentrinda homamaso, pro meĉetoj[1] altstaturaj, kiuj impresige pentriĝas per siaj minaretoj sur la ĉielkoloro, por ĉiuj nuancoj de mistera Oriento. La urboj kalkulas miljaran estadon, sed ili plene kaŝis konstruajn principojn de malnova mahometana arto.

La ĉefa urbo — Taŝkent — estas urbo de la kontrastoj. Malvastaj, polvoriĉaj stratetoj, ĉiam bolantaj per amaso da homoj, ŝarĝitaj azenoj, kameloj kun sonoriletoj parolemaj, altradaj veturiloj, karakteriza bruemo de orienta bazaro — kaj eŭropaj stratoj, tramoj, aŭtomobiloj, misteraj minaretoj — kaj radio-anteno; eklezia lernejo, kie la Korano estas preskaŭ sola lernobjekto kaj — universitato. Ĉefa okupiĝo de kvarmiliona loĝantaro de Uzbekio estas plantado de kotono.

Tram-ta-ta... tram-ta-ta...

Denove renkonte kuras dezertaj vast-

[1] Temploj.

alpojn. Krome ŝi malŝatis lernadon kaj riproĉis al li, ke li lernis esp-on. Li ne postulis de ŝi div. sportojn, sed li deziris, ke ŝi lernu esp-on. Ŝi ne faris kaj ili ne geedziĝis. Li laŭdas la grandan utilon de l' sporto por ambaŭ seksoj kaj por la infanoj kaj opinias, ke por la kunvivado de l' seksoj precipe necesas vivo sobra, laŭnatura.

K-do 7359 (Francio) same kiel la antaŭa K-do konsentas plenan elekt-liberecon al K-do Kozako. Li diras, ke la "beleco de virino" kuŝas en la saneco, ke nia socia tasko estas flegi tiujn, kiuj spirite aŭ korpe malsaniĝis en la terurai vivkondiĉoj de urbaj aŭ kamparaj industrioj. La forto de l' proletaro estas, ke la geedziĝoj okazas pro amo, ne pro komerco. Tial laboristoj, kamparanoj naskas infanojn, kiuj malgraŭ terurai deven-kondiĉoj venkas burĝidojn eĉ en burĝaj lernejoj. "Ni elektu belan virinon, sekvu naturon, eĉ se tiu virino estas iom "koketa". Se vi atentus elekti nur komunistinon, vi perdus okazon venigi ĝis tiam senpartian personon al socialismo . . ."

KIEL SOLVI LA ANTITEZON?

Respondo de Elzasano al K-do 7359

Via respondo al Kataluno en n-o 249 de "S-ulo" instigis min okupi min pri kelkaj eraretoj esprimitaj de vi. Unue la vortoj "Alzaca, Alzacio" ŝajnas al mi tute ne bonaj k nebezonaj, ĉar ni jam posedas la radikon "Elzaso", kiu certe estas etimologie pli ĝusta ol tiuj neologismoj (Vidu la oficialan klasikan libron).

Plie mi ne kredas, ke iuj elzasaj infanoj iam riproĉis al siaj gepatroj pro neinstruado de la germana lingvo, ĉar tio certe nur estas la rolo de la lernejo. Tie la infanoj ricevas la unuajn instruojn pri la literatura lingvo. La elzasa dialekto neniam k neniel povas anstataŭi la germanan lingvon, kiu cetere estas ĝia ido. En la skribaj interrilatoj de la elzasanoj, en iliaj gazetoj k periodaĵoj, eĉ sur la impostfolietoj de la franca registaro uziĝas la literatura **germana** lingvo.

Per la vortoj "iredentaj regionoj formas en la mondo ridindan societon", K-do V. iomete ŝajnis primoki la aŭtonomistan movadon elzasan. Tio pruvas al mi, ke li tute ne konas la cirkonstancojn ekzistantajn en niaj du provincoj "liberigitaj" fare de la francoj. Estas certe tute facile kvalifiki ion kiel stultaĵon, kion oni vidas nur tra la okulvitroj de la nacilingvaj gazetoj; ĉiuj franclingvaj gazetoj estas partiecaj pri niaj elzasaj aferoj.

Laŭ la marksista principo proleto ne havas patrujon; do unuavice povus esti indiferenta, ĉu mi laboras sub mastroj komprenantaj aŭ ne mian gepatran lingvon. Sed praktike prezentiĝas la afero tute aliel. En nacia ŝtato la laboristo, oficisto ktp., kiu nur komprenas sian gepatran lingvon, ĉiam estos malprofitigata rilate al alia laboranto scipovanta la nacian idiomon (en nia kazo la francan). Tio okazas precipe en la grandaj entreprenoj, kies estraro estas nurfranca, aŭ en la ŝtataj administrejoj. Tie indiĝenaj laboristoj k oficistoj estas ĉiam malprofitigataj, eĉ kelkfoje persekutataj pro sia deveno "kontraŭnacieca" k lingva nescio. La elzasa aŭtonomista movado tute ne estas klerikala afero gvidata de pastraro nek burĝeca, kiel asertas konstante la naciecaj francaj gazetoj. Male ĝi sin bazas sur la tuta popolo laboranta, kies plej granda malamiko estas la nacieca burĝaro. Se vi iom priatentis la lastjarajn balotojn en Elzaso - Lotaringio, vi bone rememoros pri la venkoj de la aŭtonomistaj-komunistaj kandidatoj. Elzasanoj tute ne deziras ŝanĝi la naciecon, ĉar tio ne signifus ian plibonigon de la vivstato de nia laborularo. Tio, kion ni deziras, estas la administrado de niaj internaj provincaj aferoj per ni mem, sen la kontrolo de ia aŭtoritato en Parizo, kiu ne komprenas nian lingvon, nek nian ceteran vivkoncepton. Plie ni demandas egalrajtecon de nia germana lingvo kun la oficiala franca antaŭ la juĝejoj, en la administraj interrilatoj ktp. Eĉ la komunista partio en konsidero de la ekzistantaj faktoj devis meti en sian programon la punkton pri la liberigo de l' elzasa popolo de la franca imperialismo k subpremo. La kompartio eĉ superis la aŭtonomistajn postulojn, postulante ĝeneralan publikan voĉdonadon (plebisciton) pri la estonta sorto de niaj du provincoj.

Mi ne povas kredi, ke en aŭtonomia Elzaso-Lotaringio nek la Kolmara komplotproceso, nek la persekutoj al centoj da politikuloj k partianoj fare de la registaro, nek la malpermeso de politikaj gazetoj pro uzo de "fremda" lingvo (la germana) estus eblaj. Kial niaj rusaj amikoj donis aŭtonomian memregadon al ĉiuj popoloj ne havantaj la saman nacian kulturon k lingvon kiel ili? Ĉu ne, por permesi al tiuj ĉi iamaj subpremitaj popoloj iagradan progreson en kultura k socia rilato?

Ŝajnas al mi, ke la lasta vorto en tiu afero ne ankoraŭ estas parolita k ke la gvidantoj de nia organizo nepre estos devigataj revizii sian ĝisnunan vidpunkton tro teorieman[1].

Elzasano (7663).

[1] La Gvidantaro de SAT neniam difinis sian vidpunkton pri tiu demando k sekve tute ne bezonas ĝin "revizii". Sed, kompreneble, ĉiu el la gvidantoj havas la saman rajton kiel K-do Elzasano, kiel ĉiu SAT-ano, eldiri sian *persona n* opinion pri iu ajn problemo. Direkcio de SAT.

---

aĵoj. La suno preskaŭ dolorigas okulojn per sia ardado, la varmo sufokas.

Novaj homoj: altkreskaj, longvizaĝaj, belstaturaj, malhele vestitaj — turkmenoj.

Turkmenio estas lando de liberema popolo. Prauloj de nuntempa turkmeno ne konis kampan laboron, — ili estis lokŝanĝemuloj, brutposedantoj, kiuj ne rifuzis ankaŭ militakirajn invadojn al la najbaroj. Sed venis rusoj. Turkmenoj pli longe ol aliaj turkestananoj defendis sian liberecon, sed la forto triumfis. Lando estis venkata, la loĝantaro kunpuŝata, ĉar la plimulto da plantebla kampo estis konfiskata je utilo de rusaj alvenintoj. Turkmenoj estis devigataj ekkomenci kampan laboron, ĉar paŝtado jam estis ne ebla. Sed ĝis hodiaŭ ili preferas al ĝi fiŝkaptadon, ĉasadon kaj ĝenerale liberajn okupojn. Malgraŭ sia malriĉeco la popolo estas tre adaptiĝema al ĉiuj vivkondiĉoj, tre vivema, poeziema kaj muzikema. La virinoj ĝuas relativan liberecon, almenaŭ oni ne vualas ilin, sed ili tamen estas flankigataj de ĉiu partopreno en sociagado: kialo — la sama "adat" kiel ĉe kirgizoj. Estas tre lertaj kudristinoj kaj brodistinoj la virinoj, — tapiŝoj de loka produktado ne cedas per sia kvalito al la tutmonde famaj, la persaj. En Turkmenio troviĝas ĉ. duonmiliono da loĝantoj.

Tram-ta-ta . . . tram-ta-ta . . .

Senlace interbabilas la radoj; pensemon ili inspiras per sia interbabilo kaj elvokas rememorojn . . .

Multaj estas popoloj, kiuj loĝas en vasta Turkestano. En dezertaj stepoj de Kirgizio, en verda Fergana valo, en sabloriĉaj varmegaj dezertoj de Postkaspmaro, ĉe glaciaj supraĵoj de Pamiro, — ĉie loĝas la posteuloj de iam sinjora mahometana imperio.

Riĉega estas Turkestano: ĝiaj riveroj de sur glaciaj montoj alportas trezoran ŝlimon kaj nutras per ĝi varmajn kampojn, igante ilin fariĝi mirige kreskopovaj kaj fruktodonaj. En ĝiaj montoj troviĝas sennombraj minoj kaj utilaj elfosaĵoj; ĉe montpiedoj verdiĝas nuksaj arbaregoj; la ĝardenoj donas multspecajn fruktojn, la maroj: Kaspa kaj Arala — fiŝaron, la stepoj — brutaron.

Belega estas Turkestano: la plej grandegaj montoj estas ĝiaj limoj de Ĉinio, Hindio, Afganio kaj Persio. Glaciaj kronoj de la montoj eterne brilas en ĉielkoloro. Ĝiaj urboj estas muzeoj de mahometana pasinto, de malnova mahometana arto, ili allogas homojn de tuta mondo per sia beleco, per severaj principoj de la konstruado kaj ornamo; eĉ ĝiaj dezertoj kaŝas ne eltrovitajn trezorojn, kiuj atendas la mastron.

Riĉega studmaterialo estas la historio de Turkestano, ĉar ĉiu peceto da ĝia tero memorigas ian historian fakton. Kaj ĉu la pasinto de la socio ne estas lernmaterialo por arto de nuntempa soci-konstruado? . . . (Daŭrigota.)

ATENTIGO!

Ni ricevas ofte diversajn grup-fotojn k. s., sed bedaŭrinde la sendantaj K-doj ne indikas, ĉu ili pagas la prezon por la kliŝo al nia Administracio. Sekve ni devas flankenmeti tiujn fotojn. Ni memorigas refoje ĉiujn sendantojn de bildoj, kiuj rilatas grupan vivon ktp., ke tiaj fotoj ne povas esti aperigataj senpage en "S-ulo", sed ke prezo de 10 mk. g. po kliŝo devas esti pagata al la Administracio.

K-doj, kiuj sendas al ni manuskriptojn por la ĝenerala parto de la gazeto, estas petataj, se eblas, kunsendi ilustron por eventuala uzo! Red.


SENNACIULA SPORTA PAĜO

Kompilanto: Ad. Wendt, Leipzig O 27, Lange Reihe 11-a (Germ.)

La 2-a Laborista Gimnast- kaj Sportfesto

18.—21. julio 1929 en Nürnberg

La devizo de la festaranĝantoj jam estis de komenco, ke la 2. Asocifesto de la germanaj laboristaj gimnastuloj kaj sportuloj nepre atingu kaj eĉ superu la unuan asoci-feston en Leipzig 1922. Oni tutprave povas diri, ke la esperoj faritaj por la festo plene efektiviĝis kaj ke ili firmigis plene la tradician reputacion de la germanaj laboristaj sportaranĝoj. Vole nevole ĉiuj rememoris pri la tagoj en Leipzig, ĉar denove la sama entuziasmo trafluis la vicojn de la festpartoprenantoj kaj transiĝis al la loĝantaro de la festurbo. Denove la amasoj tramarŝis en brila manifestacio dekduope la centron de la urbo, denove — kiel en Leipzig — la almarŝo por la amasaj liberekzercoj estis akompanata de pluvego kun fulmo k tondro, denove arbaro da standardoj almarŝis — se ankaŭ en alia formo — sub aplaŭdegoj de miriadoj da rigardantoj, kiuj ne forlasis siajn lokojn spite la pluvego. Sed: pluvo, vento — ni ilin priridas!



Manifestaciantaj sportuloj en Nürnberg

Tio estis la vortoj, per kiuj la asocia prezidanto Gellert enkondukis siajn festparolojn kaj kiuj koncize kaj klare respegulas la animstaton de la partoprenantoj ĉe la amasaj liberekzercoj.

80000 festpartoprenantoj estis alveturantaj dum jaŭdo kaj vendredo en preskaŭ 100 ekstraj vagonaroj. Riĉe ornamitaj per standardoj salutis la kvartaloj de la laboristaro kaj kora partopreno de l' tuta laborularo kreis la bazon por bona prospero de la festo. Bonega stadiono, konstruita sur la historia Zepelin-kampo, kontentigas ĉiujn pretendojn, kiujn tiurilate povas havi koro de sportulo. Ĉie oni plenumis la unuajn konkurojn kaj faris la lastajn provojn por la liberekzercoj. Premante brilegis la suno. En la konkurejo, sur la ludkampoj, en la luktejo, en la naĝejo kaj dancringo, ĉie estis vigla vivo. Estas apenaŭ imageble, ke alia sporta organizo kapablus aranĝi sportan feston de tia amplekso kaj multvarieco.

La enkonduko de la festo okazis per malferma soleno en la magistrata domo, en kiu paroladis reprezentantoj de la urbo, la ministro por internaj aferoj K-do Severing, la prezidanto de la regna parlamento Löbe, reprezentantoj de la socialdemokrata partio, de la sindikataro, de la Socialista Sport-Internacio Laborista, de la eksterlandaj fratorganizoj kaj de simpatiantaj laboristaj organizoj. Ĉiuj rekonis la altan kaj gravan kulturan signifon de la laborista sporto kaj la internaciigajn celojn de la movado.

Special-prezentoj ĉe la Asoci-festo

Por ebligi al la sektoroj de la asocio, esprimi siajn proprajn konceptojn pri moderna korpkulturo kaj por akceli la multflankecon de la prezentaĵoj, okazis specialaj prezentoj.

La s u d - g e r m a n i a n o j prezentis sekcian gimnastadon por 140 rigoj[1] kun 4500 partoprenantoj.

Ĝojiga vigleco montriĝis ĉe la ekzercoj de 18 a ŭ s t r i a j k n a b i n o j. — plejparte Vienaninoj — kiuj ruĝvestite montris sur la verda herbejo de la dancringo ritmajn ekzercojn. Inter tiuj ekzercoj kaj ekzerco-sistemo de la germanaj gimnastinoj de l' asocio ja estas konstatebla diferencego. Tie ekzercoj, plejparte atentantaj la formbelecon, tie ĉi celkonformeco de la ekzercoj, kiuj ekzercas la tutan korpon.

La s a k s o j sub gvido de Otto Zimmermann (Leipzig), prezentis dancversaĵon laŭ fabelo de Andersen, "La koloraj ŝuoj", kies muzikon komponis Hermann Heyer (Leipzig). La ideo de l' verko: Ludo pro vanteco kaj egoismo, kiu estas transkondukata al venko de la komunspirito, estas subtiligita formo de niaj ĝisnunaj ritmaj danc-scenigoj kaj unua komenco de estiĝanta fest- kaj danckulturo en Laborista Gimnast- kaj Sportasocio.

B ü t t n e r t a n z (b a r e l f a r i s t a d a n c o): Vere belkolora bildo: la distrikta lernejo Nürnberg prezentis la barelistan dancon, laŭhistorie origine; ĝi entuziasmigis la tutan rigardantaron.

G i m n a s t i n o j d e l a d i s t r i k t a l e r n e j o B e r l i n prezentis bonkombinitajn gimnastikaĵojn. La s u d - g e r m a n i a l i g o prezentis kun 2×40 gimnastinoj tre plaĉajn dancojn.

[1] Sportulaj rotoj.

La asoci-lernejo

Ĉefa allogaĵo en la prezentaĵoj estis la du prezentadoj de la asocilernejo vendrede en la Apollo - teatro. Posttagmeza prezentado sub la devizo: "De infanoj por infanoj" montris la manieron, kiel la infanoj praktikas korpekzercojn sub fakula gvidado en Laborista Gimnast- kaj Sportasocio. Senbrida petolemo kaj ridanta, laŭimpulsa gajeco montriĝis el ĉiuj ekzercadoj. Kaj tio estas la ĝusto, ĉar nur tiel oni akiras komplete la infanan animon kaj kondukas ĝin — nerimarkite de la infano mem — per celkonforma laboro en la esencon de la laborista sporto. La vespera prezentado "Nia korpo" estis plena sukceso. Post enkonduko de efikplena parol- kaj movhoro: "Ni paŝadas", junulinoj prezentis ekzercojn. Sekvis junuloj kun medicinpilkoj kaj prezentis idealan gimnastadon ĉe barno[1] kaj saltŝnuroj.

Poste venis gimnastinoj, prezentantaj gimnastikajn evolu-ekzercojn, transkondukantajn en aplikformojn. Plej viglan intereson trovis interesa komparo de la varb- kaj festekzercoj de la 1. asocifesto en Leipzig 1922 kun tiuj de la 2. asoci-festo. Jen pleje evidentiĝis la praktika valoro de la senlaca esplorlaboro de niaj asociaj teknikuloj. Finata la vespero estis per sportaj kantludoj, kiuj, kiel ĉiuj aliaj prezentoj, rikoltis aplaŭdegon.

A p o g e o n d e l a f e s t o formis la f e s t l u d o d e l a a s o c i a j u n u l a r o, kiun rigardadis pli ol 50 000 personoj. Dekmiloj devis reforiri. "Liberigu vin!" estas la titolo de la verko, kiu celas ribeligi la amasojn, volas for-

[1] Paraleloj.

igi la amuzemon kaj prepari la vojon por nova pli bona estonto. Emocie estis la ĵuro parolita de miloj da junaj laboristaj gesportuloj. Ĝi finis per la kanto: "Fratoj al sun', libereco". Poste torĉa manifestacio je longo de kelkaj kilometroj tramarŝis la noktan Nürnbergon ĝis la foirejo, kie la junularo denove alvokis la flankestarantan laborist-junularon, eniri la vicojn de la laborista sportularo.

Dromsportaj[1] asoci-majstrecoj

Viglan moviĝemon disvolvis la dromsportuloj en la ĉefkonkurejo. Krom la germanaj sportuloj konkuris finnoj, hungaroj, aŭstroj, ĉeĥoslovakoj, poloj kaj latvoj. Malgraŭ la varmego dum la du unuaj festotagoj estis atingataj atentindaj rezultoj: svingpilk-ĵeto: Küfner (Nürnberg — tramistoj) 59,31 m. (nova asocia rekordo = n. a. r.) — ĝis nun 57,31 m. En la 400 m. — kuro atingis Brammer (Fichte, Hamburg) novan asoci-rekordon en 52 sek., post Wall, Finnlando, kiu kiel unua trakuris la celon en 51,8 sek. La disk-ĵetado rezultigis plialtigon de la asocia rekordo de 37,13 m. al 38,30 m. La ĵetinto estas Bräutigam (Arnstadt). En lancĵetado Drache (Heidenaŭ) starigis novan asoci-rekordon per 53,96 m. (ĝis nun 50,92). Takkinen ĵetis la lancon 60,30 m. La 110 m. — barilkuron venkis Wall-Finnlando en 15,8 sek., antaŭ Naumann (Leipzig). En la 4×100 m.-stafedo venkis Vieno en 44,2 sek., dum ĉe la junularo Vorwärts-Süd, Leipzig, venkis en 46,8 sek. Venkanto en la 200 m. — kuro fariĝis Etholén-Finnlando en 23 sek. La 100 m. — kuron de virinoj venkis K-dino Stiebitz (Nürnberg-Süd), en 13,1 sek. Wagner (Leipzig) gajnis en la 5000 m.-kuro en 15 min. 40,2 sek. (Interdistancaj tempoj: 1000 m. 3 min. 05,5 sek.; 3000 m. 9 min. 22 sek.) La finno Maluri estis la tria kun 15 min. 51,5 sek. 10×100 m. por viroj, Vieno, 1 min. 52,3 sek. (asocia kaj internacia rekordo) 2. Feuerbach 1 min. 52,8 sek. 4×100 m. vor virinoj: Dresden-Cotta 53,7 sek. Stangaltsalto: 1. Legler (Dresden-Friedrichstadt), 3,50 m.; 2. Döbert (Hausen) kaj Schulze (Weisswasser), 3.40 m. Sume partoprenis la dromsportajn konkurojn 1650 gesportuloj.

Piedpilk-ludoj dum la festo

En la ĉefkonkurejo kaj en 35 piedpilk-ludejoj en kaj ekster la stadiono la piedpilkuloj tre vigle moviĝis. Ĉirkaŭe 150 trupoj konkuris en societaj ludoj kaj pro la asocia majstreco. Plej impone ludis la trupoj de Weiden (Sud-germania majstro)—Südost-Leipzig (Mezgermania majstro) 5 : 2 (3 : 1). 40 000 rigardantoj ĉeestis tiun eminentan konkuron kiun Weiden glate venkis. Pliaj signifaj rezultoj estas: distriktaj trupoj Nürnberg—Leipzig 3:1. La urbaj trupoj Berlin—Dresden ludis 3 : 3. La Berlinanoj estis pli temperamentaj. La ludo de la sektoraj trupoj Virtembergo-Turingio estis teknike altnivela. La interurban ludon Mannheim—Frankfurt a. M. gajnis Frankfurt 10 : 1.

La akvosportaj konkuroj

Dum grava varmego la naĝantoj vendrede kaj sabate plenumis sian konkurprogramon. En la decidaj konkuroj estis atingataj jenaj rezultoj: 400 m.-brustnaĝado por viroj: Lux (Berlin) 6 min. 43,9 sek. 100 m.-dorsnaĝado por virinoj Frohn (Berlin) venkis glate en 1 min. 36,1 sek. Vira flanknaĝado 100 m.: Faulde (Breslaŭ) 1 min. 17,3 sek. Liberstila naĝado: por junuloj: 100 m.: Trippensee (Berlin) 1 min. 13 sek. Virina poz-stafedo: 3×100 m.: Nürnberg 4 min. 5,7 sek. Saltado de viroj: Stiehler (Dessaŭ) 62 2/3 poentoj.

En la belege lokita Dutzendteich apud la stadiono laboristaj akvo-veturantoj montris al multnombra publiko kanotveturadon, remadon kaj kanot-poloľudadon. Tiu tre juna movado povas fieri pri sia ĝisnuna evoluo kaj la rezultoj atingitaj dum la asocia festo.

Manpilkaj ludoj

La viglan praktikadon en manpilkludo skizu sekvantaj ciferoj. Okazis sume 62 societaj ludoj. En tiuj estas: manpilkaj: por ludantoj 33, ludantinoj 1, junuloj 3. Rafpilko: ludantoj 3, ludantinoj 1, junuloj 1. Pugna pilko: 12 ludoj. Hokeo 2. Puŝpilko 3. Por la Asocia Majstreco konkuris: manpilko: ludantoj 14, ludantinoj 3. Rafpilko: ludantoj 3. Pugna pilko: ludantoj 12, ludantinoj 2. Tamburinpilko 7. Ludoj de la elludigitaj trupoj: manpilko: 5, pugna pilko 1. Sume 47 ludoj. Je tenisturniro okazis 117 naciaj turniroj, internaciaj 26.

En la manpilk-ludo pro la asocia majstreco gajnis la 10. sektoro kontraŭ la 5-a 4: 2 (1: 0). Vigla, bonega ludo.

Interlanda manpilk-ludo Germanio —Aŭstrio 17 : 2.


La pez-atletoj

En la kadro de la asocia festo ankaŭ partoprenis la Germana Atleta Asocio, kiu disvolvis internacian programon en luktado kaj boksado. En la boksado partoprenis 59 boksuloj, kiuj kompare al la Olimpio en Frankfurt tre bone evoluis teknike. Nur unu venkon forportis latvo, dum ĉiuj aliaj venkoj restis en Germanio. Ankaŭ en luktado estiĝis tre interesaj konkuroj.

La finiĝo de l' festo

Dimanĉon, je 20-a horo, la festo estis finata per adiaŭaj vortoj de la festa komitato kaj de la asocia prezidanto K-do Gellert. Ambaŭ esprimis sian dankon kaj kontentecon al la loĝantaro kaj urba estraro de Nürnberg kaj al ĉiuj partoprenantoj, kiuj akcelis prosperan disvolvon de la festa programo.

La Leipziga junularo manifestigis la ĉeestantaron al ĵuro pri fidelo al la asocio kaj ĝiaj celoj. Man' en mano staris la 100 000 ĉeestantoj kaj agordis la Internacion — jen la plej signifa momento de l' tuta festo.



Liberekzerca gimnastiko en Nürnberg

Sporta Fakkunsido de la 9. SAT-Kongreso

Impona manifestacio el pli ol 100 gesportuloj esp. marŝis kantante de la kongresejo al la Lab. Gimnast- k Sportlernejo. Salutis la kunvenintojn la prezidanto de Lab. Gimnast- k Sportasocio de Germanio, K-do Gellert. Li akcentis, ke estas granda ĝojo por li, saluti la esp. sportulojn en propra domo. La amikeco inter niaj movadoj ne plu estas nova. K-do Wendt tiam raportis pri la agado de la Sporta Komitato. Li konfesis, ke ne ĉiam estis eble al li k liaj helpantoj, dece plenumi la necesajn laborojn, ĉar ili ja havas ankoraŭ aliajn okupojn. Sed li ankaŭ riproĉas k plendas, ĉar la kunhelpemo de la eksterlandaj K-doj ankoraŭ estas tre malbona. El la raportoj de la eksterl. K-doj nur tiu de K-do Jonas (Vieno), k letero de Lab. Sportasocio de Finnlando estis rimarkindaj. K-do Jonas alvokas la ĉeestantojn, agiti jam nun por la 2. Lab. Olimpio en Vieno 1931. La elektado de la Sporta Komitato rezultigis reelekton de la ĝisnunaj K-doj: Wendt, Schröter k Mersiovski (Leipzig), Matjas (Smolensk) k Lundström (Helsinki). Krom tio estis elektataj: Fielding (Cardiff, Anglio), Jonas (Vieno, Aŭstrio) k Feldmann (Plzen, Ĉeĥoslovakio).

---

[1] Malpez-atletikaj.

TRA ESPERANTIO

Lau kia metodo oni devas instrui esperanton?

Mi ne bedaŭras, ke en nia gazeto (n-o 248) aperis ampleksa reklamo por la metodo de s-ro pastro Ĉe. Ĝi havas efektive sian meriton, laŭ mia esploro. Tiun meriton mi volas nomi "entuziasmiga". Li instruas al la komencantoj laŭ rekta metodo, montrante la objektojn kiel ajn, ĉu per bildoj, ĉu per la montreblaj objektoj mem aŭ gestoj. Liaj lernantoj ripetas la samajn vortojn kaj frazojn 1001-foje rutine kaj baldaŭ li respondas: Jes, mi komprenas vin!... Laŭ tiu flatkuraĝiga respondo de s-ro Ĉe, la lernantoj entuziasmiĝas kaj penas profunde lerni la lingvon. Sed bedaŭrinde estas, ke, kiam ili volas konstrui aliajn frazojn per la lernitaj vortoj, ili troviĝas en granda embaraso pro tio, ke en gramatika kaj sintaksa vidpunkto, ili ne multe povis sperti.

Mi ne volas diri per tio, ke s-ro Ĉe ignoras la plej bonan pedagogian sintaks-metodon aŭ la esp. gramatikon! Ne!... Mi nur volas pruvi, ke la malfaciloj, kiujn ofte oni trovas en la e k l e r n o de esp-o, ne kuŝas en strukturo de la internacia lingvo mem, sed en tiu de la nacia.

Ĉiu komencanto konstruas la frazojn laŭ la nacia stilo aŭ idiotismo kaj ne povas kompreni, kial li eraras, se oni ne klarigas al li en nacia lingvo. Do, necesas ke la instruanto estu samlingvano, aŭ almenaŭ konu la koncernan nacian lingvon por povi klarigi al la lernanto, ke ne kulpas esp-o, sed la nacia fraz-konstru-maniero.

Tiun ĉi fakton s-ro Ĉe ne ignoras, tial li, por ne fiaski en sia metodo, invitas siajn interpretistojn por traduki liajn frazojn laŭ la ĝusta senco kaj klarigi la kialon. Unu el tiuj interpretistoj estas iu s-ro Morario (se mi ne eraras). Sekve de tio la Ĉe-metodo ĉesas esti "rekta".

La fantazia progres-nombro da novlernantoj (tri miliardoj naŭcent okdek kvin milionoj sepcent kvardek mil = 3 985 740 000) post tri jaroj da Ĉe-metoda instruado, igas min kredi, ke en 1933 eĉ la katoj kaj hundoj scios esp-on, ĉar sur nia planedo ne troviĝas sufiĉe da homoj (1 800 000 000) por plenumi la Ĉe-revon.

Mi emas eĉ kredi, ke s-ro Ĉe eble intencas vojaĝi al la Luno (per helpo de "ĉiopova" dio) por instrui esp-on al ĝiaj loĝantoj. Ĉar sur la Tero li ne efektivigos tian "miraklon". Se tiel estas, ni SAT-anoj nur povas deziri al li: Bonan vojaĝon!! La svedaj esp-istoj ne kredu, ke se li forlasos la teron, ni ne plu povos trovi alian "metodon" por eklerni esp-on kaj perfektiĝi en ĝi! — Per kia metodo ni povas pli facile eklerni la internacian lingvon, K-do Soares? oni eble ekdemandos.

— Per lerte verkita lernolibro! — mi respondas.

Tia lernolibro devas esti sinteza. Ĝi devas enteni komence facilajn klarigojn pri la nacia gramatiko en nacia lingvo mem. Ne ĉiuj konas gramatikon kaj la plejmulto el tiuj, kiuj ĝin lernis, forgesis jam delonge la regulojn. La fundamentaj gramatikaj elementoj devas esti klarigataj per facilaj ekzemploj. Poste oni nacilingve klarigas la 28-literan esp. alfabeton, komparante ĉiun literon per similsona litero el nacilingva alfabeto. Tiele komencantoj "kurioze" antaŭenpaŝas.

Tiam oni prezentas al la lernanto la unuan esp. lecionon, akompanatan de bildoj numeritaj. Oni verkas tekston konforme al la bildo en esp-o kaj en nacia lingvo. Ĉiuj vortoj de la teksto devas esti lernataj aparte kaj figurataj en la koncerna leciono kun nacia paralelo en formo de leksikono, t. e., ĝi devas konsisti nur el vortoj, kiuj koncernas la bildon. En ĉiu leciono oni enkondukas du aŭ tri afiksojn. Krome, ĝi devas enteni malgrandan nacilingvan temon, kies enhavo koincidu kun la lernitaj vortoj kaj klarigoj gramatikaj troviĝantaj en la sama leciono.

La tasko de la lernanto hejme estas traduki la nacian tekston en esp-on kaj la esp-an en nacian lingvon. Ne estos superflue aldoni malgravan taskon, kiel ekzercon por la konstruado de la kunmetitaj vortoj, kiuj ĉiam devas rilati nur al la klarigoj, kiuj troviĝas en la kadro de la lernata leciono. La unuaj lecionoj devas esti tre simplaj kaj neniam oni devas trudi la akuzativon en la komenco. En ĉiu leciono devas figuri malsimila bildo, — sekve malsimilaj tekstoj.

De la komenco oni lernas la vortojn leksikone. Ekz., se la bildo prezentas la homan korpon, vortareto troviĝos ankaŭ tie, nur enhavante vortojn rilatajn la homon. Tiuj vortoj devas esti grupigataj gramatike, ekz.:

Substantivoj	Adjektivoj	Verboj	Diversa
korpo	riĉa	ridi	ofte
kapo	dika	kanti	jes
piedo	forta	tikli	nun
intesto	sana	salti	laù
hepato	bela	dormi	for

Tiele la lernanto kutimiĝas distingi la substantivojn de la verboj, la verbojn de la adjektivoj ktp. pro tio, ke li vole nevole rekonas la objekton per ĝia konstanta finiĝo "o", ĝian kvaliton per "a" kaj ĝian movon per "i". Enkondukante proksimume 100 vortojn en ĉiu leciono kaj variante ĉiam la tekstojn pri homa korpo, scienco, metio, kooperativo, agrikulturo, socialismo ktp., — dum 15 lecionoj proks. la lernanto sen malfaciloj akiras, tute kvazaŭ ludante, la elementan scion pri esp-o, kiu laŭ mia sperto pli valoras ol multaj blufaj metodoj.

Tia lernolibro entenas ankaŭ en ĉiuj lecionoj klarigojn pri la naciaj idiotismoj, kiel ekz.: En Svedio mi demandis al kelkaj komencantoj: Kioma horo estas? Ili ĉiuj respondis laŭ la nacia stilo: "Estas la horloĝo naŭa." Kie vi estis? "Mi havas estis en la vilaĝo." Kion vi deziras? "Mi volonte volas tion." Kion vi faris? "Mi havis kantis." ktp.

Mi penis klarigi al ili, ke en esp-o ekzistas nur unu sola helpa verbo, "esti". Sed vane; ili ne komprenis. Ĉu vi ne scias, kial ili ne komprenis? Tre simple... pro tio, ke ili ne konis la vortojn, kiujn mi uzis! Mi petis, ke unu el la progresantoj klarigu al ili en nacia lingvo kaj ili tuj komprenis la malgrandan eraron. Ĉu oni povas per rekta metodo klarigi tiujn diablaĵojn, se oni ignoras la lingvon, en kiu la lernanto havas fiksita la spiriton? Mi neas: precipe en kursoj por novkomencantoj. Kia ajn rekta metodo taŭgas nur por progresantoj, kiuj jam komprenas vortojn en sufiĉa kvanto. Por komencantoj la rektaj metodoj taŭgas nur por rompi la kapon al ili kaj al la instruanto mem, aŭ igi la lernantojn balbuti rutine kiel la papagoj.

Sed kion fari en tiu okazo? — oni demandos. Imitu la francajn K-dojn! — mi respondos. La lernolibro, pri kiu mi aludis, ekzistas fakte. Ĝi estas la metodo, laŭ kiu la franca proletaro lernas esp-on. Mi mem lernis esp-on per ĝi, apenaŭ sciante la francan lingvon. (Mi estas portugalo.) Dank' al ĝi, la francoj ne bezonas alvoki eksterlandajn metodulojn. La libro estas titolita: "Cours Rationnel et Complet d' Esperanto" = Racia kaj Kompleta Kurso de Esperanto. Ĝi estas eldonita de la Lab. Esp. Federacio (FEO) kaj ne propagandas nur por esp-o, sed ankaŭ por la Federacio kaj SAT. Ĉiuj ĝiaj ekzemploj spegulas proletan karakteron. Por konvinkiĝi pri la realo, provu nur mendi unu ekzempleron en Parizo (rue Bagnolet 177), prezo: 8 frankoj por eksterl., kaj vi juĝos persone, kiom valorus la enhavo por vi, se ĝi estus tradukita en vian nacian lingvon. Per ĝi oni ne nur lernas, sed ankaŭ f i n lernas la lingvon. Ĝi estas pedagogie sinteza kaj meritas reklamon. NUR VOLU, K-DOJ!

Soares (6727).

[1] Paralelo en nacia lingvo.

FABELOJ de Hermynia Zur Mühlen

Kion rakontas la amikoj de Peĉjo

La konata aŭtorino donas per tiuj ĉi pensigaj kaj emociaj rakontoj el laborista vivo bonegan legaĵon al niaj geknaboj kaj gejunuloj. Sed ankaŭ plenkreskuloj ĝuos la legadon de tiu bela rakontaro; niaj K-doj precipe ŝatos la fluan lingvon, la belan stilon, la facilan legeblecon. Aĉetu kaj legu!

Prezo 0,60 gmk. — 56 pĝ.

Administrejo de SAT, R. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27.

KIAL NI MEM MALHELPAS AL NIA LABORO

Senpacience mi ĉiam atendas "S-ulo"n: eble ĝi almenaŭ parte kontentigos la adresmalsaton, kiu konstante suferigas la LABESKON. Feliĉe adresoj enestas, sed konsternite mi haltas antaŭ ili: Kiujn el ili preni? Kiel ekscii la aĝon, la profesion, emojn kaj interesojn de la korespondpetantoj? Ĉu mi ne riskas interligi astronomon kun tajloro? konstruiston kun dancistino kaj profesoron kun junpioniro?

Mi demandas la K-dojn anoncpetantojn, kial ili tiel obstine rifuzas komuniki la informojn pri si, kiuj helpus pli raciigi la korespondadon, fari ĝin pli interesa por la korespondantoj mem. Ja ĉiu el ili preferos korespondi kun samprofesiulo, kun homo, kiu havas similajn interesojn.

Denove mi ripetas mian alvokon: sciigu en viaj anoncoj vian aĝon, profesion, emon. Interligu kaj peru korespondadon de neesperantistoj. Larĝigu diversmaniere la korespondadon — ĝi estas la plej efika rimedo por nia venko.

I. Lisiĉnik.

* * *

Ofte okazas, ke iu K-do, skribinte laŭ adresoj en "S-ulo", ricevas kartojn, en kiuj oni pardonpetas pro nepovo korespondi, ĉar oni estas superŝutitaj per korespondaĵoj. Tiel la elspezo je mono kaj tempo estas vana, kio malakcelas nian sukcesan korespondon. Por eviti tiajn rezultojn, mi proponas, ke ĉiu anoncinto, kiu ricevis tro da korespondaĵoj, laŭpove transdonu la adresojn al alia K-do, kiu devas tuj komenci korespondadi laŭ ricevita adreso.

13 354, Sovetio.

ESPERANTO KAJ PROLETA ARTO

En Parizo okazos ĉe la Belvilŭaz (Bellevilloise; Sidejo de SAT k de la Lab. Esp. Grupo) dum septembro, kiel lastjare, proleta art-ekspozicio. Lastan jaron estis kvazaŭ nura hazardo, ke ekspozis en ĝi esp-ista artisto. Agu ni ĉi-jare metode! K-doj artistoj, artmetiistoj ĉiulandaj, alsendu por tiu ekspozicio multvizitota viajn verkojn, viajn artobjektojn (kun indiko de la vendprezo) ĝis 15. sept. Adresu: Pariza Lab. Esp. Grupo, 23, rue Boyer, Paris XX-e.

Someraj monatoj!

Oni ekskursas! Oni kantas!

La

Proletaria Kantaro

estos utilega al vi!

Ne diru, ke ĝi kostas tro multe: Centoble rekompencata estos la mono elspezata por tiu libro!

Prezo: 2,50 mk. g.

Mendu ĉe Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27, Germanio

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

ĈEĤOSLOVAKIO. Plzen. Socialdemokrata kultura societo "Delnicka Akademio" aranĝis ekspozicion, kiun ankaŭ aktive partoprenis lab. esp-istoj per sia propra ekspozicio (esp. gazetoj, libroj, glumarkoj, stampiloj, poŝtmarkoj, diagramoj, statistikoj). K-do Pech ekspozis memoraĵojn el siaj vojaĝoj tra la mondo. — **Danio.** La esp. movado en Danio estas momente malforta. Nur antaŭ nelonge oni komencis pli grandskale propagandi. Kurso perkoresponda havas 319 partoprenantojn, eĉ kelkajn sur la malproksimaj Färöer-insuloj. Centra Dana Esp. Ligo (neŭtrala) havas 211 membrojn. Instruista Esp. Ligo 50 anojn. Dum la jarkunveno de tiu Ligo en Holbeck ĉeestis ĉ. 50 p., inter ili 7 svedoj k 1 germano. Manko de taŭga lernolibro estas multe sentata. Baldaŭ aperos nova lernolibro laŭ gramatika metodo de instruisto Fries. Oni decidis interrilati kun lab. radioasocio pro esp. kurso per radio. La lab. esp. movado estas treege sensignifa. Nur ekzistas klubo en Odense kun 17 K-doj, inter ili 6 SAT-anoj. En Kopenhago estas 2 studrondoj ĉe la socialista junularo kun po 10 lernantoj k 2 SAT-anoj. (W. Krey, 5486.) — **GERMANIO. Chemnitz.** LEA-distrikto Erzgebirge-Vogtland nun nombras 27 grupojn kun 350 membroj, inter ili 42 virinaj. Estas 48 kursgvidantoj. El tuta membraro estas sindikatanoj 274, liberpensuloj 66, SAT-anoj 114, legantoj de "S-ulo" 86, de "La Nova Epoko" 10, de naciaj lab. gazetoj 222. Eksiĝis el eklezio 180 anoj. 93 korespondas individue, 17 peras kolektivan korespondadon. Venonta distriktkonferenco okazos 1. sept. en Harthau ap. Chemnitz. I. a. raportado pri SAT-kongreso, estrarkunsido de LEA k intern. soc. junulartago en Vieno. Fondiĝis interne de la soc. junularo "esp. laborkomunumo de la soc. junularo en distrikto Chemnitz". (3018.) — **SOVETIO. Samara.** Fervoja esp. oficejo ĉe Admin. de Samaro-Zlatousta fervojo daŭrigas dissendadon de peresp. leteroj tra la tuta fervoja reto. Ili estas legataj ĉe kunvenoj, presataj en div. pres- k mur-gazetoj. Ne eblas noti k kalkuli ĉiujn gazetojn uzantajn peresp. materialon. Ĉefaj ĝeneralaj gazetoj "Mezvolgia Komuno", "Mezvolgia Komjunulo", "Radiogazeto", ankaŭ utiligas la let. La unue nomita gaz. presigis en feb./apr. ĉi jare en 11 n-oj materialon pri esp-an; krome en 7 n-oj aperis 16 peresp. leteroj, el ili 4 kun kliŝoj (5583.) — **V.-Voloĉek.** Perbicikle tra la mondo vojaĝanta K-do Posern (el Germanio, 12 008) alvenis en nia urbo jam traveturinte 6 landojn k farinte 7000 km. Vizitinte div. fabrikojn k paroladinte pri sia vojaĝo k lab. situacio en Germ., li propagandis ankaŭ por esp-o. Multaj ĉeestantoj unuafoje vidinte eksterlandanon en sia urbo, tuj volis aranĝi kursojn por lerni esp-on, sed konsiderante la someran periodon, tiu afero estis prokrastata ĝis aŭtuno. Post du tagoj K-do P. forveturis al Leningrado k poste tra Siberio en Japanion k Amerikon. (8375.) — **SVEDIO.** La sveda lab. gazetaro pli malpli detale raportis pri la 4. kongreso de la Sveda Lab. Esp. Asocio, okazinta 7. julio en Örebro. K-do Adamson donis la raporton pri la stato de la Asocio: Kresko je ĉ. 300 membroj; nuna stato: pli ol 1100 izolaj membroj, 87 kolektiv-aliĝoj de organizoj. Krom la teknikaj raportoj oni pritraktis la demandon de kursoj ĉe radio. Ĉeestis eksterl. gastoj, reprezentantoj de LEA en Germanio k Aŭstrio.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Volter, KANDID AŬ LA OPTIMISMO. Esperanta traduko de E. Lanti. Antaŭparolo de la tradukinto. Ilustroj de R. Bartelmes. 162 pĝ. Form. 13×19 cm. Prezo: 1.70 mk. g. Eld.: SAT, Eldona Fako Kooperativa, Leipzig O 27.

Mi samtempe legis tiun ĉefverkon de Volter (france: Voltaire) k la ĵus tre famiĝantan verkon "Im Westen nichts Neues" (Okcidente nenio menciinda) de E. M. Remark (fr.: Remarque). Ambaŭ estas pri- k fakte kontraŭ-militaj verkoj, do ĉiam aktualaj, dum patriotismo daŭradas regi spiritojn. La kontrasto inter tiuj du samcelaj libroj estas granda, k ĝi karakterizas tre klare kaj okulfrape la malsamecon inter klasika k nuna post-romantika stilo[1]. Nia samtempulo Remark suferis k pentras tre talente sian propran suferon. La suferojn de liaj amikoj ni ankaŭ nur vidas trans la emocioj de Remark mem, aŭtoro k heroo de sia verko (kvankam li feliĉe ne mortis, kiel lia heroo, dum 1918 sur okcidenta militfronto).

Kiam Volter-on premas samspeca sufero, li, dekok-jarcenta verkisto, anstataŭ esprimi tiun suferon mem, priesplorante, kulturante ĝin, — faras el tiu sufero penson, eĉ ŝercon. Tio estas klasikeco: pentri kvazaŭ senpasie. — Nur kvazaŭe, ĉar pasio bolas sub pentro. La forto en komiko ĉe Volter nur estis ebla, ĉar li tre pasie suferis, koleris, protestis en si mem kontraŭ la krueloj de sia tempo. Tiun premitan pasion li subite liberigis sub formo de geniaj ŝercoj kaj pensoj. Ĉe Remark ni vivas dum horoj en tranĉeo, ni ricevas la vundojn, ni perdas mortantajn amikojn, ni demandas: "Kial milito?" Ni flaras putran odoron de hom-buĉ-kampo. Ĉe Volter la romano flugas, ridetante super bataloj, hombuĉoj, seksperfortoj al la simpatiaj heroinoj, drono k pendigo de la simpatiaj herooj, k ĉiam komike, ŝajnas. Sed malgraŭ tiu komiko stranga sufero nin kaptas samtempe kun ridado. La faktoj efikas per si mem, k eble nur Volter kun sia facila, rapida stilo, kapablis montri en konciza verko la

---

[1] *K-do Jief skribas al ni, ke li faris tiun (certe iom riskan) komparon inter la klasika Volter k la tute ne klasika Remark, por permesi al si facilan perekzemplan klarigon pri klasikismo k romantismo. Ankaŭ, por elstarigi k karakterizi pli oportune en kontrasto la verkmanieron de Volter.* N. B.

tutan homaron de sia jarcento kun la tiamaj malbonegoj, kiuj funde ne ŝanĝiĝis depost lia tempo.

Volter, Remark, ĉiu en siajarcenta stilo, plene sukcesas, ekmovi nian justan koleron.

Ni tre ŝuldas dankon al K-do Lanti, ĉar li elektis k tradukis tiom belan verkon. Li ĝin tradukis kun plezuro k perfekto: en ĉiu laboro, nur laborplezuro ebligas perfekton, bon-arton, eĉ en la laboro naski infanojn, aŭ traduki verkon. Reakciuloj-stultuloj, kiuj estas superstiĉaj eĉ en lingvo-scienco, ofte asertas, ke Volter aŭ Rab'le aŭ aliaj, kiuj skribis lingvon nun iom ŝanĝitan, "ne estas tradukeblaj", ĉar tiu vorto, ĉar tiu nuanco, ĉar tiu delikat-sento estas tiom... tiom... tiom... La samaj stultuloj ekstazen falas, antaŭ bildoj tute forkolorigitaj, detranĉitaj, ne plu videblaj, ĉar tiuj bildoj estas antikvaj, do tiom... tiom... tiom... Tute kontraŭe, la stilo de granda verkisto estas tre fortoplena **kaj simpla.** Ritmo, belo, forto estas en la pensoj mem. La konversacio de kortegistino perdas sian signifon post du jarcentoj (sed ĉu ĝi iam posedis signifon?). Granda verko, ne.

Inter la modernaj francaj verkistoj al Volter plej parencas Anatol Frans. Jen frazeto, ekzemple, kiun li estus esprimintа kun la sama sentmaniero:

"Ambaŭ estis multon vidintaj k suferintaj... Tamen Kandid havis grandan avantaĝon super Marten: li ĉiam esperis revidi Fraŭlinon Kunegond, dum Marten havis nenion por esperi..."

Lanti tradukis klere k klare tiun luman stilon de Volter; li skribas same simple k pripens-plene, — k mi vetas, ke la proksima verko, kiun tradukos Lanti, estos libro de Anatol Frans.

Eterna homkono tiel estas semata tra la tuta verko, kvazaŭ nevideble, inter aventuroj tra la tiam konita mondo, tiom rapide rakontataj, ke ĉe ĉapitrofino vi ofte surpriziĝas foliumante la ĵus legitajn paĝojn: "Nur ses paĝoj, k mi tiom travivis?" Jief.

Miŝu Beraru, SPITE LA VIVON! Poemaro. Form. 12×16 cm. 114 pĝ. Prezo ne montrita. Esperanto-Instituto, str. Gl. Grigorescu 55/57, Cluj (Ruman.).

La aŭtoro kelkfoje sukcesas fari spritaĵon, sed tre malofte. Tre ofte li atentigas per kelkaj punktoj... "Atentu, ridu!" Oni ne ridas.

La vortfarado, la skribmaniero estas bonaj, rekomendindaj. Bedaŭrinde, mankis tiu fajrero, sen kiu verko ne vivas.

Tre surprizas min speciala ludo, ĉu orienta? En "PROLOGO", de K-do Miĥalski, ankaŭ, troviĝas tiaj, ekzemple:

NE EKZISTAS...

Amatino sen kaprico,
Nek diablo sen malico,
Nova domo sen fenestro...

ktp. dum plenaj paĝoj. Ok poemoj inter kvindek, el tiu poemaro, komplete apartenas al tiu sistemo. Multaj aliaj tre parencas. Burĝaj enuigaj ludoj. Burĝaro sukcesis malbeligi ĉiujn artojn. Dum sia regado, en 19-a jarcento kaj komence de l' 20-a, la burĝaro forigis en muziko Wagner, Berlioz, nur aplaŭdis banalaĵojn de Meyerbeer, Ambroise Thomas (Mignon), de aliaj nun tute forgesitaj muzikverkistoj. Meblaro de l' burĝaro, skulptarto, konstruado, estis la plej malbelaj kaj malkomfortaj el ĉiuj konataj civiliz-tempoj. Vestoj de l' burĝaro estis tute ridindaj, ne-praktikaj: virinaj krinolino, korseto, pantalonoj de 1830, — viraj cilindroĉapelo, melonĉapelo, kolumo kun kolrubando, frako kaj aliaj vost-vestoj.

En literaturo, plejo da verkoj kaj tradukoj de niaj "kamaradoj" neŭtraluloj ŝajnas ĉerpita el tiu vestoŝrankaro de plej malbongustaj burĝaj geavoj.

Tio odoras je tineoj kaj naftalino.

Jief.

Oficiala Bulteno de la Esperantista Akademio. Kajero I. Junio 1929. Paris. Esp. Centra Librejo, 51, rue de Clichy. Prezo: 1 fr. sv. 24 pĝ. Form. 15×23 cm.

Tiu ĉi kajero, kiu enhavas la raportojn de la Lingva Komitato kaj Akademio, estas speciale interesa pro tio, ke en ĝi estas presitaj la vortoj, kiuj konsistigas la "kvaran aldonon al la Universala Vortaro". Multaj el tiuj vortoj estis uzataj jam de Zamenhof, sed ankoraŭ ne estis oficialigitaj. Ĉiujn ilin oni kompreneble trovos en la SAT-vortaro.

N. B.

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"

De **"IDEAL"**-metalista fabriko laboristoj deziras korespondadi kun samprofesianoj. Ni produktas laktujojn, **Moskvo 10,** ul. Durova 37, zav. "Ideal".

Al junkomunistoj de urbo Düsseldorf!

Protektanta al vi organizo de junaj komunistoj el urbo Lugansk deziras starigi kolektivan peresperantan interkorespondadon de siaj ĉeloj (ĉe urbaj laborejoj, fabrikoj kaj institucioj) kun komjunulaj ĉeloj el via urbo. Temoj de interkorespondado: junkomunista kaj pionira movadoj, kondiĉoj de laboro de laborista junularo kaj aliaj. Proponojn kaj adresojn sendu al: K-do Neskorodjev, Bjuro Svjazi, Oktjabrskij Rajonnij Komitet Komsomola, urbo **Lugansk,** USSR.

K-do BONESPER R.

estas tro ŝarĝata per amaso da novaj koresp.-proponoj de eŭropaj Gek-doj, kiuj skribis, kvankam li anoncis nur por ekstereŭropaj gekorespondantoj. Ĉiuj skribintoj ricevos respondon post iom da tempo. De nun ricevotaj koresp.-prop. el eŭropaj landoj ne plu estos akceptataj. Nur seriozaj aferoj komuninteresaj estos respondataj. Li dez. havi novajn koresp. nur el ekstereŭropaj landoj, precipe Japanio, Ĉinio, Afriko. Adr.: K-do Bonesper Ruĝamo, p. a. Modern Book Shop, 350 East 81st street, **New York City** (Usono).

Grava novaĵo por geinstruistoj tutmondaj!

Soveta Pedagogia Revuo

celas informi ĉiujn edukistojn kaj interesulojn pri kleriga kaj pedagogia laboroj en Sovetio.

Abonprezo: por 5 kurantaj n-oj **2.10 mk. g.,** ponumera prezo **0.50 mk. g.** Inkluzive afranko!

Abonebla en la **Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.**

★ ★

Gek-doj el la tuta mondo, atentu!

La Okcident-Londona SAT-Grupo aranĝos dum septembro **ekspozicion** por montri al la tiea laboristaro la utilecon de esperanto. Bonvolu sendi taŭgan materialon al K-dino L. Judd, 93. Cornwall Road, **W. 11, London,** antaŭ la 24-a de sept.

★ ★

MEBLAĴISTARO EL ĈIUJ LANDOJ!

Sendu artikolojn pri via laboro, spertoj, vivkondiĉoj ktp. por presigi en la maldekstra labĵurnalo "La Ĉizilo" (angle: "The Chisel") al S. Harris (11 072), 81, Chapeltown Rd. **LEEDS** (Britio). — Respondo garantiata.

JUNULOJ! ATENTU!

Okaze de l' internacia junultago (1. IX. 29) el ĉl. amase sendu de viaj junulorganizoj al niaj L (salutojn, priskribojn de via vivo, laboro ktp.), ankaŭ viajn nacil. junulgaz., afiŝojn k. a. Adresu: USSR, **Samara,** Dorprofsoj, al B. Esperkoro.

Al laborista junularo de l' tuta mondo!

Oktobra Komitato de junkomunistoj de urbo Lugansk deziras starigi kolektivan kaj individuan interkorespondadon peresperantan de junkomunistaj ĉeloj de sia urbo (fabrikaj, laborejaj, kooperativaj, studentaj ĉeloj) pri temoj: politikaj, ekonomiaj, kondiĉoj de laboro kaj vivmaniero de laborista junularo. Do, multnombre respondu al ni laŭ adreso: K-do Surkov, Bjuro Svjazi, Oktjabrskij Rajonnij Komitet Komsomola, urbo **Lugansk,** USSR.

K-do Levĉenko, O., Sverdlovskaja 70, DNEPROPETROVSK (SOVETIO), dez. koresp. pri div. temoj kun junularo ĉ. l. Resp. estas certa.

VLADIVOSTOK (USSR) — POŜTKESTO 56

K-doj Anatolo Semjonov kaj Jakobo Zuj deziras longdaŭran korespondadon per L, PI pri aktualaj laboristaj problemoj kĉl., precipe kun Pacifik-oceanaj kaj Latin-Amerikaj ŝtatoj. Respondo estas garantiata.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

L'Ouvrier Textile, Verviers, 26. 6., Jap. Laboristinoj (244); Uj Elöre, Novjorko, 5. 6., La Internacio de l'kapit. (235), 8. 6., Soveta Alasko.

Priesper. artikolojn k notojn enhavis:

Signalen, Stokh., 20. 6.; ITF-Bulteno, Amsterd., 15. 6.

Pri la SAT-Kongreso raportis:

Literatura Nordo, Arĥangelsk, 9. 6.

Peresp. materialon enpresis:

Der Kampfruf, Berlin, majo; Der prolet. Atheist, Leipzig, aprilo.

NIA POŜTO

Atentigo al ĉiuj. Sendoj de manuskriptoj, kiuj estas destinataj por nacilingvaj ĵurnaloj, ne estu adresataj al la Red. de "S-ulo". La adreso de "L'Humanité" estas: Paris (2), 123, rue Montmartre.

5459. — Vian alvokon ni ne povas enmeti senpage.

8048. — Ni ne uzos vian manuskripton pri la striko, ĉar ni jam antaŭe ricevis artik. pri la sama afero el Aŭstr. mem.

6532. — Ne. Via manuskripto estas transsendita al la lit. red. de "LNE" en Moskvo. Interrilatu kun K-do N. pri la afero.

12 573. — Ni respondos al via demando pri la elparolo de c (= ts), tuj kiam ni mem havos la respondon de S. Grenkamp. Red.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis

AŬSTRIO

K-do Heinrich Hampeis, Speckbacher Gasse, 30, Wien XVI, dez. interŝ. PM, kĉl., escepte Germanio.

K-do Franz Jaritsch (fotoamatoro), Bahnhofstr. 10, Bad Ischl, dez. koresp. kun Sovetio pri ĉ. temoj, L, PI. interŝ. pentraĵojn memfaritajn.

K-do Felix Schweighart, Gstättengasse 7, Salzburg, dez. interŝ. nur PI kĉl.

BELGIO

K-do C. Severius, Touwstraat, 22/I, Antwerpen, dez. interŝ. PM per 250 aŭ 1000 specoj.

— La L. E. G. "Nia Ideo", Antwerpen, Geestenstr. 53, St. Mariaburg-Eeckeren, dez. koresp. kolektive k individue kĉl. pri ĉ. temoj. Nepre resp.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-dino Manjo Ŝilhánkova, Sladkovskèho str. 29, Plzen, V., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Certe resp.

FINNLANDO

K-do Paavo Auranen, Hallituskatu, 17, r. F., Tampere, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L, PK. Resp. garantiata.

GERMANIO

K-do Erik Hannemann, Barnstorfer Weg 23, Rostock, dez. koresp. kĉl., L, PK, PI, il. gaz. ktp.

K-do H. Klüpfel, Hofheimer Str. 164 h, Schonungen a. M., dez. koresp. kĉl. pri socialistaj junular-demandoj.

K-do H. Scheuplein, Kirchgasse 16, Schonungen a. M., dez. koresp. kĉl.

— Esp.-oficejo (Hondl), Gottesberg i. Schl., petas fotojn, PK, PI, esp. gaz. — K-dinoj, sendu varbleterojn por propag. vespero porvirina. Samvalora kompenso garantiata.

K-do Fritz Bernst, Gartenstr. 21, Ulm a. D., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

K-do Walter Reschke (popolinstruisto), Ahnensdorf Ukm. ap. Templin, dez. koresp. kun Svedio, Holando, Danio, Estonio, Finnlando, Islando, Norvegio k. a. l., krom Sovetio.

— Kvar K-doj dez. interŝ. PK, PI, PM. Tuj ĉiam resp. Adr.: K-do Georg Stumpfegger, Salzburghofen 51½, ap. Freilassing i. Bay.

HISPANIO

K-do Rosendo Bonas, Gignas, 10—3°, Barcelona, dez. interŝ. PM kĉl. per 25, 50 aŭ 100 specoj ĉl.

K-do Jozefo Anglés Prous, str. Canalejas, 21, pral. Barcelona, dez. koresp. kun Gek-doj el ĉl. (ĉefe kun Sovetio, Francio k Azio). Resp. garant.

NEDERLANDO

K-do J. A. Timmers, Amezonestraat, 57, Den Haag, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Certe resp.

Neniam plu milito!

Gek-doj el ĉiuj landoj! Ge-SAT-anoj! Socialista Junularo München aranĝos dum aŭgusto **kontraŭmilitan ekspozicion.** Montru, ke esperanto servas al la mondpaco! Sendu: gazetojn, kartojn, leterojn, afiŝojn, flugfoliojn kontraŭmilitajn ktp. al: K-do Albert Heinzinger, Kol. Harthaus, **Post Germerring** ap. München.

Respondo garantiata!

SOVETIO

K-do I. Baŝkirov, Černiŝevskaja, Zoosad, Kazan, dez. koresp. nur pri biologiaj temoj, L, PM.

K-do Konstantino Čencov (librotenisto), Bajkalskaja, 44, Stalingrad, dez. koresp. kun Ameriko, Aŭstralio k Afriko, PI. Resp. garantiata.

K-dino Lariso Demjanik, Ĥut Trudobelikovskij, domo de Leonido Demjanik, St. Slavjanskaja, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L, PK, PI.

— 2 amikoj: Timoteo Poĵogin k Paŭlo Belokurov, ul. Lagernaja, 146, St. Slavjanskaja, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L, PK, PI.

K-do S. N. Suetin, Puŝkarevskij per. 5, Talickij Zavod, Uralskoj oblasti, dez. koresp. pri arto k literaturo kun angl., hisp. k germ. K-doj.

K-do M. Omeljan (instruisto), Suraĵevka, Amurskij (Zejskij) okr., dez. koresp. pri pedag., natur. k div. temoj, L, PK, PI. Resp. garantiata.

K-do Mikaelo Zolotavin (termezuristo, fotoamatoro), ul. Buĥarina, 20, Stalingrad, dez. koresp. L, PK, kĉl., krom Sovetio. Resp. garantiata.

K-do S. B. Liberman, ul. Ĵukovskogo, 29, Odessa, dez. seriozan korespadon, interŝ. nacil. gaz. kĉl. Nepre resp.

— Gelaboristoj de Ŝtata muelejo dez. koresp. kun laboristoj de nutraĵ. industrio, pref. de muelejoj, kĉl. pri lab. k vivkondiĉoj. Adr.: Rostov/Don, Budenovski, 75—77, Fabzavkom Gosmelnici N. 3.

K-do A. Gurin, Poĉtov, jaŝĉik, 82, Rostov/Don, dez. koresp. kun gejunuloj el ĉl. pri lab. k vivkondiĉoj.

K-do K. Šeĥaljov (fervojisto, kalkulisto), Tatarskij per. 2, kv. 4, Tomsk, Siberio, dez. koresp. kun Gek-doj el ĉl. pri div. temoj, L, PK, PI, ktp.

Atentu! Lernantoj de Agrikultura Teknikumo dez. serioze koresp. pri ĉiuj temoj kĉl. Ĉiam respondos al seriozaj temoj. Adr.: Agrikultura Teknikumo, **Kaluga** (Sovetio).

INSTRUONTO SERĈATA!

Ni serĉas K-don, kiu kapablas instrui esp-on laŭ rekta metodo, ne sciante la germ. lingvon. Ni garantias al li senkostan vivon, loĝejon kaj laŭeble minimume 100 mk. g. por tri monatoj. Preferata estas senlaborulo. La kursoj komenciĝu en septembro. **LEA-distrikto Mecklenburg.** Skribu al K-do R. Graetz, Waldemarstr. 17, Rostock (Germanio).

ENHAVO:

	pago
Modernaj sociaj ideoj en la Antikveco	453—54
Kelkaj faktoj pri la Ĉinia-Orienta Fervojo	454—55
La flandra movado	455—56
La Laborista Problemo en Usono	456
Lasthore	456
Vojaĝo al Londono	457—58
Pri la pola maldekstra socialista partio	458
"Porrikolta milito" en sovetia vilaĝo	458—59
Pri "Popolaj Domoj" kaj similaĵoj	459
Sur patriotaj batalejoj	459
Piedpilkludo — la ĉefa distro en Britio	460
Fumado inter virinoj kaj junulinoj	460
Turkestan-Ĝumĥurijat (Felietono)	460—62
Diskutejo	461—62
Atentigo	462
Sennaciula Sporta Paĝo	463—64
Tra Esperantio	465—68
Anoncoj, Korespondado	467—68

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)